



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 7 FF. Abono por 1988 kun adresaro : 35 FF.

Pók : 3371 74 M BORDEAUX, Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque

ENHAVO

* Ĉu somero ? (Valo)	... 2
* <u>Nia debato</u> : ESPERANTO 100-JARA... KAJ POSTE ?...	3
(Kribo, Nicole Déjean, Jakelino, Ĵanseb, Jean-Claude, J.C.Picquet, Garolo, Oksana, Suzanne, Kribo)	
* Vortoj de Maljunulo (Valo)	... 15
* Alkroĉe al la vivo (Nikolin') 19
* La nova statuto de la homo (Thiego de Mello)	... 20
* Malfermita letero al UNESKO (Korejŝa A.O.)	... 21
* Poemoj (Hagen Hirte, Paŭlo Eluard)	... 20 kaj 25
* Libera kaj feliĉa (Edgard Jamart)	... 26
* <u>Ĉies voĉo</u> : P.Dieumegard, Rejal, Valo, Dik, L.A., Oksana, Jakelino	... 31
* Nia novelo : Tosto (A.I.Kuprin)	... 40
* Tiel bela stacidometo ! (J.Manceau)	... 43
* Por niaj infanoj (Gastono)	... 45
* <u>Ĉies voĉo</u> : Shao Shukang.	... 48
* Laŭtaj informoj	... 51
* Kio estas la Abundana Frakcio de SAT ?	
* Adresaro de Laŭte! 1987/88	
* Nikolin' kantas (Kribo)	
* Krucvortenigmo (Sfinksido)	

La venonta numero aperos fine de novembro.



ĈU SOMERO ?

Florako, la 1an de aŭgusto.

Ĉi-jare en tuta Francio la monato julio estis pli aŭtuna ol somera : alternado de pluvaj tagoj kun fulmotondroj kaj de akraj ventoj transportantaj grizajn nubegojn. En la monato nur trifoje mi min banis en la rivero kune kun sentimaj gejunuloj, kaj mi rezignis pri longaj marŝadoj kaj grimadoj tra la mont-deklivoj odorantaj je genisto, eriko, timiano kaj lavendo.

Kompense la ĝardeno estas tre verda, kun multaj floroj, super kiuj flugetas abeloj kaj papilioj ; sur la arbobranĉoj ĝoje pepas birdoj, inter ili belkanta najtingalo. Ni rikoltis multajn ĉerizojn, fragojn, frambojn, riboberojn, kaj kelkajn frue kreskintajn fungojn.

Tiel, kia ajn estas la sezono, ĉiam agrabla estas la somerferio en Cevenoj. Tion scias ĉiujare pli kaj pli multaj nordanoj (ne nur el Francio sed el tute norda Eŭropo : belgoj, nederlandanoj, germanoj, britoj, skandinavoj), kaj ankaŭ sudanoj, kiuj fuĝas de la sunrostata malalta Langvedoko por serĉi sur niaj montoj malvarmetan, malpezan aeron.

Tiel, en nia urbeto, preskaŭ nur vilaĝo, en kiu vintre loĝas apenaŭ pli ol dumil homoj, nun svarmas diversdevenaj turistoj kaj feriantoj. Ĉi-jare venis ankaŭ kelkaj dekoj da arbargardistoj kaj profesiaj fajrobrigadanoj kun impona materialo por eventuale helpi la lokajn sindonemajn volontulojn en la lukto kontraŭ fajro. Sed, graŭ la malseka vetero kaj malgraŭ la fulmotondroj, eble ankaŭ dank'al jam aplikitaj antaŭzorgoj, ni ankoraŭ ne aŭdis la malbonaŭguran alarmsignalon, kiu kutime en ĉiu somertago anoncis incendion en iu proksima arbaro : ĉiam malbono estas al io bona.

Ni do ne grumblu kontraŭ la fantazon de la meteoroj, sed ni sciu trovi en ĉiu epoko la bonan flankon, kiu iafaje sin kaŝas. Saĝa estas tiu, kiu bonvenigas ĉian okazon, kaj sekvas la konsilon de la antikva poeto : **Carpe diem** (pluku la tagon).

Valo.

Nia kriminala felietono (daŭrigo)

Pri Laurent-Nicolas Tamman (vd. en "Laŭtaj informoj") : Oni povas tamen peti lian pardonon al la prezidento de la franca respubliko :

Monsieur le Président de la République, Palais de l'Élysée, 75008 PARIS

Francio

(afranko senpaga interne de Francio)



ESPERANTO 100-JARA... KAJ POSTE ?

Kribo :

Finiĝis la unua jarcento de Esperanto. Ni pripensu pri la aktivado de la Movado dum tiu periodo kaj ni celu adapti ĝiajn ontajn aktivadojn al la socio de la dua. Tio estas necesa kondiĉo por pli glata progresado. Jen kelkaj rimarkoj :

* Montriĝis iluzia la espero, ke nacia registaro povus per leĝo helpi al la enkonduko de E-o en la lernejojn, aŭ ke internaciaj instancoj povus adopti mem E-on por sia funkciado, kaj tiel akceli ĝeneralan uzadon. Estus pli racie kalkuli nur pri la propraj kapabloj de l'Movado por ne malŝpari energion, monon kaj esperon en vanaj klopodoj.

* Montriĝis vana kaj eĉ danĝeriga la kompromitado de ieaj E-asocioj kun totalismaj aŭ faŝismaj reĝimoj en la espero, ke tio ebligus malkaŝan pluaktivadon.

* Fariĝis evidentaĵo, ke la utiligado de E-o por "la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda" ne povas esti efika rimedo en nia epoko por atingi la "finan venkon"... Cetere, ĉiuj kulturaj aŭ klasbatalaj partioj, sindikatoj, asocioj, havas pri tio saman amaran sperton. Oni eĉ povas sin demandi, ĉu en nia epoko iu Lanti baraktus por starigi apartan asocion kiel SAT, aŭ ĉu li prefere instigus uzi la pli taŭgan strukturon de la ĝenerala E-movado por pli facile disvastigi la celaron de la laborista esperantismo.

nia debato

* Male, aspektas pli kaj pli grav-ega la moto, laŭ kiu ĉiu mond-

lingvano devus strebi eksternacie senti, pensi kaj agadi. La plimultigo de denaskaj esperantistoj, la senĉesa profundigo de ĉies lingvoscio, la pliintensigo de esp-istaj interrilatoj, ŝajnas nepre atingendaj celoj.

* La idealisma (aŭ romantika) periodo de E-o estas for, eĉ se el ĝi restas kelkaj grizharaj spuroj. Spite blufajn argumentojn de tro fervoraj varbemuloj, la utiligado de E-o en la komerca kaj teknika fakoj restas utopiaĵo. La granda plimulto el la esp-istaro estas ja mezklasa grego de turismemuloj. Sed turismo povos neniam esti sufiĉa instigilo por flegi movadon havantan la ambicion, kiu animis la pionirojn. Kelkaj proksimume anglaj vortoj povas sufiĉi por kontentigi la bezonojn de ordinara turistoj.

Kiuj do estu la efikaj instigiloj por la post-1987-aj jaroj ?

Kompreneble, tiuj pripensoj aspektos tro draste pesimistaj. Estus ĝojige, se aliaj debatemuloj povus prezenti argumentojn por pli esperdonaj perspektivoj.

Nicole Déjean :

Mi havas apud mi verkon faritan de Eugen Weber, profesoro pri historio en la Universitato de Los Angeles, "La malapero de la hejmgrundoj en Francio", kaj ĉapitro titolita "Lingvoj abundas" precize interesas min por pritrakti la temon de tiu 26a ĉenletero.

Ekonomiaj, teknikaj evoluoj influas la transformigon de la mensoj, de la socioj, de la civilizacioj. La tempo estas grava faktoro : la mensoj evoluas multe pli malrapide ol la ekonomiaj, teknikaj sistemoj, sed finfine neceso trudas.

Nuntempe, ekonomiistoj asertas, ke mondscale nepre devas esti starigitaj entreprenoj, negocoj por sukcesi... Konsekvence, la "laboristoj", mi preferas diri "la homoj", devas pli malpli libervole alkutimiĝi al novaj strukturoj profesiaj malfacile kontroleblaj, akcepti malfirmajn postenojn... Politiko, financo, defendo, havas internaciajn dimensiojn. Ŝajnas, ke la sindikatoj, politikaj organizoj, asocioj, kies celo estas protekto, defendo de la laboristaj rajtoj, de la homaj rajtoj, ne sufiĉe rapide aktualigis por efike elteni, fronte al tiu moderna situacio, almenaŭ nunmomente... Do, tiu evoluo postulas, ke pli-malpli rapide, devige, iu internacia lingvo sin trudos. Nun la angla lingvo ŝajnas je la unua rango pro la USA-altirado. Sed neniam en la homa historio la cirkonstancaro donis la nuntempan ŝancon al mondlingvo kiel Esperanto por sukcesi, se la homoj rifuzas esti

mekanismoj de politikaj kaj ekonomiaj profitoj, kiuj neniigas iliajn personecojn.

Jen komparo. Kvankam oficiala lingvo ekde la 16a jarcento, malgraŭ la klopodoj de la Revolucianoj de 1789, ĝis la komenco de la 20a jarcento, la franca esti fremda lingvo por la duono de la civitanoj. Kvankam trudita per konkera rajto, la franca triumfis nur kiam la administraciaj kaj ĉefe la ekonomiaj transformoj igis necesa komunan, nacian lingvon... Kio okazos, kiam estos nepre necese uzi internacian lingvon ? (malgraŭ traduksistemoj perfektigitaj, malgraŭ disvolviĝo de lingvistoj). Jen la tasko de la Esperantistoj !

La kvalitoj de Esperanto, eĉ la idealo de Zamenhof ĉiam valoras. Malvigligas nur la forto de kelkaj esperantistoj. Ni ne estas predikantoj, ni havas nek la Veron nek la Solvon sed iun valoran solvon por favori egalnivelajn interŝanĝojn, respekti diversajn kulturojn... Eĉ se Esperanto mortus, eĉ se iu E-asocio mortus, tio ne signifus, ke ĝi, ili ne pravis, ke ili ne estis valoraj...

La Esperantistoj devas esti modestaj kaj tre paciencaj : 100 jaroj ! Por la homoj estas laŭkanona aĝo, sed por lingvo ne estas la sama tempo-skalo... Esperanto plu vivos, se E-istoj vivos, utiligante ĝin aŭtentike. Ne estas la lingvo, kiu estas artefarita, sed ofte la uzado... Grava instigilo estas, ke E-o vere utilu en nia propra vivo.

Instigiloj ĉiam povas esti ke :

* Esperanto estas ŝparema, praktika, taŭga rimedo por internaciaj interŝanĝoj (sendepende de iu idealismo). Jen ekonomia, turisma aspektoj.

* Esperanto estas ne nur lingvo por internacia komuniki, sed facila lingvistika rimedo por pli bone kompreni sian propran lingvon. Jen kleriga aspekto.

* Esperanto respondas al idealo : respekto al ĉiuj lingvoj, egalvaloraj internaciaj interŝanĝoj, homaranismo... Jen etika aspekto.

Ĉe la sojlo de la dua jarmilo ne nur la estonteco de E-o estas malfirma, nia tuta mondo estas minacata... Jen kialo al niaj profundaj problemoj...

J.G. :

Kiam mi partoprenas radioelsendojn aŭ kiam mi diskutas kun ĵurnalistoj, oni ofte demandas al mi, kial E-o, kiu versajne

alportus taŭgan, facilan, malmulte koston solvon pri la lingva problemo, ne pli disvastiĝas en la mondo.

Mi kutime respondas, ke kulpas la du mondmilitoj, la totalismaj reĝimoj, nun la usona imperiismo, kiuj bremsis la disvolvadon de la Internacia Lingvo, sed pli kaj pli mi pripensas, ke kulpas ankaŭ la esperantistoj mem, ĉar ili vivas en fermitaj rondoj, kiuj kunvenas, kongresas inter si, iom ignorante la eksteran mondon. Estas mirinde, konstati kiagrade la "publiko" aŭ scias nenion aŭ estas misinformita pri E-o. Laŭ mi, informado devus esti la plej grava tasko por la Esperantistoj.

Certe, niaj E-movadoj havas malgrandajn rimedojn financajn kaj personajn, sed mi opinias, ke oni ne uzas la eblecojn.

Kelkaj ekzemploj :

En Parizo ekzistas granda librejo, kiu proponas alternativajn librojn pri ekologio, paralelaj kuraciloj, marksismo, anarkiismo, ktp... Ĝi situas en turista kvartalo "Forum des Halles". Multaj personoj vizitas tiun librejon, kie oni trovas nenian dokumenton pri E-o nur pro la fakto ke la E-istoj nenion proponis !

En ĉiu urbo ekzistas publika biblioteko. En la salono de legado oni povas ankaŭ deponi dokumentojn, ekzemple por la Francoj : "Esperanto-Actualités", "Service de presse de SAT-Amikaro". Eble kelkaj scivolemuloj foliumos ilin ?

En la grandaj urboj ekzistas ankaŭ diversaj informejoj por gejunuloj, studentoj ktp. Ofte en tiuj oficejoj estas nenia informo aŭ dokumento pri E-o, kiun oni povus proponi al la informpetantoj.

Pli kaj pli disvolviĝas minitelo kun servoj pri multaj temoj. Ĉu ne eblus starigi esperantan informilon pri tiu rimedo ?

Jen kelkaj proponoj por vigligi la informadon pri E-o. Aliajn oni povas pripensi. Nur se ekzistos sufiĉe da personoj ne fakte esperantistaj sed favoraj al E-o, la oficialaj instancoj eble rigardos E-on kiel seriozan aferon.

Pri la dua punkto : la instigiloj.

La ĉefa instigilo restas la internaciaj kontaktoj. En niaj okcidentaj landoj, kie la kontaktoj estas facilaj per modernaj komunikiloj, rapidaj transportrimedoj, organizitaj vojaĝoj, diverseco de la informiloj, oni havas la impreson (fakte falsan), ke ekzistas inter la homoj bona komunikado. Sed kiam oni legas en "El Popola Ĉinio", "Monato" aŭ aliaj E-gazetoj la rubrikon "Deziras korespondi", oni rimarkas, ke en Afriko (landoj kiel Burkina Faso, Zairo, Tanzanio...) relative multaj gejunuloj deziras havi eksterlandajn kontaktojn per E-o, ĉu individue, ĉu grupe.

Ankaŭ en la orientaj landoj kaj Ĉinio la disvolviĝo estas ligita kun la deziro havi kontaktojn, informojn el la aliaj landoj, malgraŭ la diversaj malfacilaĵoj, kiujn la E-istoj renkontas : manko de financaj rimedoj, malebleco vojaĝi eksterlande ktp. Eĉ en Francio, kiam lernantoj kuraĝas lerni la lingvon, ili malkovras la plezuron havi korespondantojn, viziti ilin dum vojaĝoj, ktp.

Ni esperu, ke la Jubileo ebligos plilarĝigi la informadon pri E-o, ĉar ĝi - eĉ en la medioj teorie favoraj al la I.L. : ekologiistoj, internaciistoj, pacistoj ktp - renkontas antaŭjuĝojn kaj malkomprenemon.

Laŭ mi, la espero ekzistas, kondiĉe ke la Esperantistoj ne rondiru inter sektemaj aŭ nur idealistaj utopiuloj.

Jakelino :

Antaŭ nelonge mi verkis enkondukon por debato pri "Esperanto kaj poliglotoj". Hodiaŭ, ricevante la kontribuojn de aliaj laŭtuloj pri "Esperanto 100-jara. Kaj poste ?", mi opinias, ke la debato, kiun mi volis enkonduki, estas nur malgranda ero de la debato, kiun enkondukis Kribo. Do mi kunfandas ambaŭ debatojn. La laŭtuloj, kiuj partoprenis antaŭ mi en la debat-rondo, bonvolu ekskuzi, ke mi ne respondas rekte tion, kion ili skribis. Sed miaj ideoj estas (tro?) konataj, kaj nuntempe mi ne havas multe da tempo por aldoni duan tekston al tiu unua. Do la legantoj pardonu, ke mi traktis nur etan eron de la vasta demando metita de Kribo.

ESPERANTO KAJ POLIGLOTOJ

Esperanton instruis al mi poligloto, profesoro Janton, kaj miaj kunstudentoj estis poliglotoj. Jam sciante plurajn lingvojn, Esperanton ni lernis rapide, kaj nun estas ĝenerala opinio, ke mi estas tre bona esperantisto.

Mallonge post mia esperantistiĝo, mi vidis ekspozicion pri Esperanto : la unua panelo komparis maljunan poligloton kun barbo, sidantan sur multaj polvokovritaj vortaroj, kaj junan esperantiston tute simpatian. Mi sentis min agresata de tiu maniero prezenti la aferon : mi estas poligloto, sed mi tiam estis 20-jara junulino, kompreneble sen barbo, eble ne bela, sed pli rigardinda ol tiu maljunulo, kaj mia poligloteco ne malinstigis min lerni Esperanton, same kiel ĝi ne malinstigis nian profesoron ĝin instrui. Kiel poligloto mi spertis ke :

- lingvo ne estas nur ilo por komuniki mian penson, sed ilo por pensi. Ne estas unue tute preta penso, kaj poste la demando "per kiu lingvo mi tiun penson esprimu?". Ne! Mi pen-

sas rekte en la lingvo, en kiu mi volas paroli. Lingvo estas unue pensilo, kaj ju pli da iloj oni havas por pensi, des pli vasta estas la penskapablo. Ĉiu plia lingvo, kiun oni lernas, plivastigas la penskapablon.

- lingvo estas ilo por koni kulturon. Esperanto estas ilo por koni iun kulturon iom specialan : diasporan, nenacian kulturon. Nacia lingvo estas ilo por koni nacian kulturon. Por tiu celo ĝi pli taŭgas ol Esperanto. Plurajn orienteŭropajn landojn mi vizitis per la helpo de esperantistoj. Mi sciis pri ili pli, ol scias ordinara turistoj. Sed GDR-on mi vizitis per miaj propraj okuloj kaj per miaj propraj oreloj : mi povis legi la sloganojn sur strato, rigardi la titolojn de la artikoloj en ĵurnalo, kompreni la konversaciojn en kafejoj, ktp, ktp, mi ne devis senĉese peti, ke oni traduku por mi. Kompreneble ne ĉiujn lingvojn de la mondo mi povas lerni, sed la landojn, kies lingvojn mi komprenas, mi konas pli bone, ol tiujn, kiujn mi vizitis per la okuloj de esperantistoj. Ne ekzistas naciistaj esperantistoj : la celo unuigi la homaron estas nedisigebla de la praktiko de Esperanto. Sed estas pluraj manieroj kompreni la unuecon de la homaro :

* "unu homaro, unu lingvo" : unueco signifas, ke ĉiuj homoj pensos, sentos kaj agos same. Ekzistos plu nur unu vero, ateismo, kaj unu lingvo, Esperanto.

* "Esperanto kiel ponto inter diversaj kulturoj" : unueco povas kunekzisti kun diverseco. La homaro unuĝos per respekto al ĉiuj kulturoj, per ĝenerala dialogemo, kaj Esperanto estos la ilo por tiu dialogo.

Mia persona opinio estas ke, por esti mondcivitano, necesas esti civitano de iu preciza loko en la mondo. Mi estas franco, civitano de Strasburgo kaj civitano de la mondo. Mia sperto estas, ke multajn homojn oni forpuŝas de Esperanto, ĉar oni konfuzas la internan ideon de Esperanto kun sia propra interpreto de ĝi. De tie fontas la kredo, ke poliglotoj estas malamikoj de Esperanto : poliglotoj estas malamikoj de unu koncepto de Esperanto. Ĉu pro tiu koncepto oni volas konsideri poliglotojn kiel malamikojn, aŭ ĉu ankaŭ al poliglotoj oni volas instrui Esperanton ? Se jes, necesas ŝanĝoj en la propagando. Oni ne povas propagandi "se vi malkapablas lerni fremdlingvojn, lernu Esperanton" kaj poste miri, ke kapablaj lingvistoj nin ignoras aŭ malestimas. Kiuj estas la celoj de Esperanto ? Al kiuj ĝi sin turnas ? Tiom longe, kiom esperantistoj ne estos klaraj pri si mem, ili ne riproĉu al eksteruloj, ke tiuj ilin ne komprenas.

Ĵanseb :

ESPERANTO, KIAL NUN ?

La idealisma periodo de Esperanto estas for. Feliĉe. Feliĉe ankaŭ restas idealistoj en la movado, kiuj pluvivigos ĝian spiriton.

Sed feliĉe ankaŭ, ke la movado iĝas iom pli realisma kaj ke ĝia disvolviĝo apogas sin sur faktoj, ne plu sur blufaj argumentoj.

Esperanto renkontas grandan sukceson en Ĉinio, eble en Iranio - ni ne plu havas multajn informojn pri tio. Traduk-aŭtomataj programoj uzas ĝin.

Neniam oni mezuris la efikecon de lingvo, kompare al kvanto da lernendaj informoj - almenaŭ oficiale. Sed tiu situacio ne daŭros eterne. Nun lingvoj estas sanktaj aferoj, sed baldaŭ ili estos banalaj homaj kreaĵoj - kiel la aliaj.

Tiujn argumentojn mi klarigos en projektita broŝuro "L'Espo revient à la Mode" (Esperanto reiĝas laŭmoda), kiun mi estas skribinta.

Mi opinias ankaŭ, ke realismo devigas nin akiri objektivajn donitaĵojn pri nia movado kaj ĉefe ... statistikojn.

Eĉ se ni eklernus, ke ni estas malpli multaj ol ni pensis, estas tamen taŭge, scii ĉu ni iras antaŭen aŭ malantaŭen.

- Sed malfacilas scii, kiu estas esperantisto... ktp...

Tamen iuj donitaĵoj estas disponeblaj : nombro da revuoj, libroj, lernantoj, kursoj... Tiuj ebligas proksimume taksii niajn progresojn - aŭ malprogresojn.

Eble ni ne atingos la finan "venkon". Sed eble ni atingos kune kun la nunaj ne-esperantistoj la finan sukceson pri inter-homa komunikado.

Jean-Claude :

Koncerne min, ĉiam mi klopodis perfektigi mian lingvokapablon al flueco kaj klareco. Ŝajnas, ke al miaj korespondantoj kaj interparolantoj tio plaĉas, instigante ilin plu dialogi kaj perfektigi la propran kapablon.

Kiu povas aserti, ke turismo tute ne favoras la disvastigon de E-o ? Ĉar supraĵa turistoj povas fariĝi scivolema vojaĝanto, kiun ne plu kontentigos "kelkaj proksimume anglaj vortoj...". Ĉi-teme ni rememoru, kiel Usono kaj Ĉinio religis diplomatiajn rilatojn : per la tablotenis.

Same en kampo komerca kaj teknika la ĝisnunaj kutimoj fariĝas pli kaj pli nekontentigaj, pezaj, kostaj, ne adaptitaj al

la hodiaŭa komunikeblo planeda.

Mi do opinias, ke pli ĝustas sin demandi, ĉu komuna lingvo aspektas pli kaj pli necesa, ol ĉu la homaro ĝin akceptos.

Restas la demando : kiu lingvo ? La pormomenta angla tre bruas, pro la teknika kaj komerca superado de Usono. Sed ĝis kiam, kaj ĉu tiu solvo estas plene kontentiga por ĉiuj ?

Konsekvence, ŝajnas al mi grave, ke ĉiu plibonigu la propran scion kaj helpu al perfektigo de la instrumento en sia fako kaj laŭ sia kapablo.

Por varbi eble pli efikas personaj kontaktoj ol amasaj informadoj (tamen ne tute forigendaj). Ĉio tio postulas paciencon, observemon, resti informitaj pri la homaj aktivadoj kaj bezonoj.

J.C. Picquet :

Ebla estonteco ĉe la sojlo de la dua sekolo

Realismo, pragmatismo... Tiuj vortoj kaj aliaj estas novaj sub la plumo de esperantistoj. Komprenible ili iras tuj al mia koro. Se oni retro-rigardas tiun unuan sekolon en la historio de Esperanto, kion oni vidas ? Kio estas grava ?

Bilanco lasas aperi, ke multo estas farita, ekzemple sur la kampo de literaturo, sed kiam oni serioze analizas libro-katalogojn, oni tuj vidas, ke ankoraŭ multo estas farenda : ĉu ĉiuj gravaj verkoj estas jam esperantigitaj ? Ne.

Kelkfoje bremsas ekzistas, ĉe la esperantistoj mem. Ekzemple, en 1984 oni ne profitis la okazon esperantigi la faman libron de G. ORWELL "1984". La kaŭzoj estas konataj. Tio estas signif-plena de problemoj en esperantio.

1. Evoluo estas notenda : la movado kiel aro da esperantistoj transformiĝis kaj fariĝis pli kaj pli ekstera parto de esperantistoj.

Ne estas novaĵo diri, ke UEA sovetiĝis. Kribo notis, ke eble Lanti ne hodiaŭ batalus por apartigi grupon da homoj surbaze de klasbatalo (laŭ 1920-a vidpunkto).

Organizaĵoj aspektas batali por iu afero malnova kaj ne grava. Ne estas la lastaj ...aĵoj de U.F.E. (nome tiu anonceto en televida gazeto "TELERAMA"), kiuj montras la malon.

Oni povas trovi sociologian kialon al tiu fenomeno : estas konate, ke grupo je iu certa grado de sia evoluo defendas pli sian propran ekzistadon ol la bazajn ideojn, kiuj gvidas ĝian estiĝon.

Komprenible, mi ne diras, ke la organizaĵoj estas negativa fenomeno, sed ke en la estonteco oni devas trapasi tiujn grupojn.

2. Mi metas forme de asertoj la evoluon de la movado, kiun mi vidas.

a) La dinamismo ne estas en organizaĵoj sed ĉe la lokaj grupoj (fakaj aŭ geografiaj, laŭ amikeco...)

b) La estonteco ne estas en plukonstruado de organizaĵo, kiu kongruus ĉiujn esperantistojn.

c) Lokaj grupoj devas aŭtonomiĝi kaj sin transformi en grupojn de produktantoj kaj konsumantoj por atingi la merkaton.

ĉ) Sur la merkato oni interŝanĝas produktaĵojn, servojn kontraŭ mono. La mono estas reinvestita en la movado.

d) Esperantistoj estos atentemaj kreskigi la produkt-kapablojn strikte esperantistajn (presejojn, komputejojn...)

Ekzemple, en Francio, kial ne krei nian propran servon "Minitel" por montri kion oni kapablas fari kaj respondi la defion de moderneco ?

GAROLO :

ESPERANTO 100-JARA... KAJ POSTE ?

Tiu priduba demando devus konduki ĉiujn esperantistojn al pri-konscia kaj konscienca alia demando : kiaj mondcivitanoj estas ni ?

Por ke E-o atingu la "finan venkon" ne sufiĉas, ke ni mem-mistifike tion kredu. La fina venko de E-o ne venos per gluado de afiŝoj, per disdonado de flugfolioj, per kulta surmetado de verdaj steloj, per defilado de banderoloj kun flagoj, per kantado de himno eĉ se temas pri "La Espero" aŭ "La Internacio", per botlekado al politikuloj aŭ aliaj "aŭtoritatuloj". E-o havos probablan eblecon atingi la "finan venkon" tute simple kaj ekskluzive se ni kiel aŭtentaj mondcivitanoj, sennaciuloj, pacamantoj aŭ aliaj raraj specimenoj uzas E-on kiel kulturlingvon, kiel unuan komunikilon. E-o neniam, aŭ eĉ ne post mil jaroj, venkos se ni lasas ĉi tiun lingvon en dua vico, kiel helplingvon, kiel akcesoran instrumenton, kiel hobian idealaĵon.

Por ke E-o venku, kaj la responso estas nur nia, ni, la idealistaj, mondcivitanaj, SAT-anaj esperantistoj, nur bezonas preni simplan decidon : uzo de E-o en nia ĉiutaga kulturo (se ne ĉiutaga socia, labora agado), uzo de E-o en nia unua socia kadro, la familio. Mi demandas : kiom da esperantistoj en la mondo uzas E-on nur dum kvaronhoro en ĉiu tago ? Kiom da esperantistoj uzas E-on kiel familian lingvon ?

Jes, la tabuoj estas pli fortaj ol ni... Ni ne volas aspekti kiel ridindaj stranguloj... Ni restas praktikaj... Ni amas nian patruon... Nia religio estas la plej bona... Ni volas resti

neŭtralaj, ĉu ne ? Nu, ni elektu nian vojon ; sed tiel, ankaŭ post pliaj 100 jaroj, E-o ne venkos. Aŭ ĉu vi ankoraŭ pensas, ke la registaroj de la tuta mondo proprainiciate aŭ sub idiota premo de longa listo kun subskriboj, per leĝo aŭ dekreto enkondukos E-on en lernejojn ? Neniam iu registaro decidus enkonduki E-on kiel tutmondan kultur-lingvon, ĉar ĉiuj homoj scias, kaj ankaŭ la registaroj, ke E-o estas unu el la plej taŭgaj rimedoj por ke la homoj (ankaŭ la ekspluatataj) emancipiĝu... Kaj ni scias, ke la interesoj de la registoj kaj "honestaj" politikuloj estas tute aliaj !

La perspektivoj por E-o ne estas tre esperdonaj, mi konsentas kun Kribo, sed por ke iom pli da espero aperu, nepre ni devas loki E-on en unuan vicon, en unuan lokon por nia kulturo de veraj mondcivitanoj, ne forgesante, ke la fina venko de nia lingvo povas prezentiĝi nur en evoluo de la malsupro al la supro de nia socio. Tion jam nedementeble diris Lanti, antaŭ 60 jaroj aŭ pli, kaj pro tio SAT ankoraŭ sukcesos postvivi, kondiĉe ke restos aŭtentaj mondcivitanoj.

Oksana :

PENSOJ EN LA JARO 1987

Sojle de la 2a jarcento ĉiu esperantisto, por kiu Esperanto ne estas nur portempa hobbio, sed amo, konscia agado de konvertito, eĉ - mi diru - nedisigebla parto de lia mio, neeviteble enpensiĝas pri trairita vojo kaj perspektivoj. K-do Kribo tre bone resumis fiaskintajn iluziojn, lecionojn de blufado kaj kompromitiĝo kun totalismaj reĝimoj, li ankaŭ metis taŭgan demandon : "Kiu do estu la efikaj instigiloj por la post-1987-aj jaroj?"

La efika instigilo, sendube, restas idearo esperantisma. "...ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri la praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo - ni ĉiuj sentas ĝin tre bone - estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj" (el parolado de L. Zamenhof dum la Ĝeneva kongreso, 1906a jaro). Ĉi tiu idearo instigis E-pionirojn, ĝi instigas ankaŭ nun. Mi firme kredas, ke generacioj de la dua jarcento laboros por Esperanto same sindoneme, kiel niaj pioniroj. Mi ne vidas kialojn por troa pesimismo, ĉar mi ne ŝatas pensi pri aliaj homoj pli malbone ol pri mi mem (t.e. " se min tiu ideo instigas jam la 14an jaron, kial ĝi ne instigu same - aŭ eĉ pli forte - aliajn?")

Garolo metas ĝustan demandon pri esenco de mondcivitan-

eco. Sed - mi ne metos asertojn "Ni amas nian patrion... Nia religio estas la plej bona" inter tabuojn, kiuj baras vojon al mondcivitaneco. Vera amo al sia patrio ne estas ĝia blinda adorado kaj senĉesa aplaŭdado. La vera amo kuniras kun doloro, perditaj iluzioj, senreviĝoj, ofte ĝi esprimiĝas en indigno, protesto, rezisto. Legu bonajn poetojn de iu ajn lando. Kiu estis la plej senkompataj al siaj samlandanoj, kiuj estis tiuj vipantoj kaj senmaskigantoj ? - tiuj, kiuj profunde amis sian patrion. La rusa poeto M. Lermontov, pelita ekzilen en Kaŭkazon (dum periodo de carisma konkerado de Kaŭkazio), adiaŭante sian patrion, skribis :

"Adiaŭ, lando nelavita,

de sinjorar' kaj sklavo land' "

Social-demokrato Ĉerniŝevski en la 19a jarcento nomis la rusan nacion "nacio de sklavo" ; ĉu, eble, li malamis Rusion ? Kiu pli forte vipis ukrainojn, se ne ilia plej granda poeto Taras Ŝevĉenko ? Multegas la ekzemploj. Mi diras : la vera mondcivitaneco estas tiu, kiu tra dolora amo al sia propra patrio alvenas al amo tutmonda, tuthomara. Alian vojon mi ne vidas.

En la 2a jarcento de Esperanto esperantistoj evoluigu sian lingvonivelon kaj mondcivitanecan sintenon. Ni zorgu pri nia propra esperantisma valoraro kaj kulturo, ja ĉi-kampe multego farendas. Laŭ mi, pli valoras unu bele eldonita alta verko (kiu per si mem faros la plej bonan reklamon) ol blufaj agitkampanjoj kaj reklamoj, dirantaj preskaŭ nenion. Se E-kulturo havos valoraĵojn por prezenti al ekstera mondo - frue aŭ malfrue tiu mondo turnos sian atenton al ĝi (ja tiu ekstera mondo konsistas ne nur el senvaloraj "aŭtoritatuloj" kaj "malhonestaj politikistoj"). Tio ne signifas, ke tute superfluas flugfolioj, afiŝgluado ktp.

La kultura agado de esperantistoj - jen kio elstaras en la 2a jarcento. Malpli da vanteco, naiveco, blufado, pli da konscia ĉiutaga laborado super sia propra edukigo kaj evoluigo de nia komuna kulturo.

Kaj fine, ankoraŭ pri amo al patrio. Verkis bona E-poeto :

Al Esperanto

Mi amas vin, sed ja amare,

Esperanton de tero al etero :

ĉu meĉo super marĉo,

aŭ sub la stuko - sterko ?

(Kris Long, el "Per 2B-krajono")

Ĉu eble, li ne amas Esperanton ?

Suzanne :

Ne eblas al mi, lasta kontribuanto, ion aldoni al la antaŭaj kontribuaĵoj, ĉar iliaj verkintoj elstudis la demandon, kaj detale priskribis ĉiujn flankojn.

Plezure mi legis iajn opiniojn, pri kiuj mi tute konsentas !

Ili estis la instigilo, kiu donis al mi la deziron lerni E-on kaj persisti en la lernado, perfektigado, ĉefe skribante, ĉar mi estis (as) tute izolita. Ĉu mi sukcesis atingi la celon ?

Jen la aludita opinio : nur homoj kiel pacistoj, pacamantoj, mondcivitanoj, SAT-anaj esperantistoj, sennaciuloj, ekologiistoj, plenumas la celon de Zamenhof, uzante E-on konvene por klarigi al la plejmulto da homoj (ĉefe al la laboristaro), ĉar ili estas ĉe la bazo en la socia skalo, kaj la emancipiĝo fontos nur el ĝi.

Garolo, detale kaj ĝuste, klarigis tion. Nun, en la socio, estas multaj malesperigaj eventoj. Tamen ni provu rezisti al pesimismo... Ja, malfacila sinteno... tio valoras por Esp-o.

Kribo : Oni permesu al la enkondukinto, kiu troviĝas ankaŭ ĉe la ĉenfino por tajpi la kolektitajn vidpunktojn, aldoni kelkajn vortojn.. por plenigi la paĝon.

En ĉiuj E-asocioj, kaj precipe en la plej gravaj, la E-centjarigo estas okazo bilanci kaj plani por la estonteco.

Multas la deziresprimoj ("oni devus..."), malmultas la homoj pretaj ion fari konkrete. Inter tiuj malmultaj troviĝas homoj, kies projektoj estas tre idealismaj, sed kiuj ne sufiĉe esploris la nunan staton de la Movado antaŭ ol proponi... nerealigeblaĵojn. Mi ĉiam konsideris devo laŭpove apogi ĉiun laŭ mi interesan projekton, ekde kiam mi vidis eĉ nur etan ŝancon pri realigo. En la nuna situacio mi opinias, ke la plejmultaj projektoj estos realigeblaj nur se kunlaboras tiucele diversaj E-asocioj, aŭ, se maleblus interesaciaj konsentoj, prefere ekster la asocioj oni arigu la kunlaboremajn homojn. Alidire, la strukturoj de la E-movado arkaikiĝis kompare al la nunaj bezonoj.

La nunaj asocioj fakte pli disigas ol arigas. Ili disigas la homojn ne nur inter si, sed, pli grave, eĉ interne de si, kaj plejofte nur pro opini-nuancoj facile akordigeblaj, se ili fontus el homoj, kiujn ne animus idealoj aŭ pasioj. Mi do subtenas la ideon plimultiigi por esp-istoj la okazojn renkontiĝi ekster la asociaj kadroj, kaj se necese realigi diversajn utilajn projektojn per rektaj rilatoj inter la E-popolanoj mem, kaj ĉie kie eblas, ligi tiujn projektojn kun neesp-istaj medioj. "Laŭte!" estas, laŭ mi, certe ne modelo, sed almenaŭ ekzemplo pri tio farebla ankaŭ sur la kampo de E-gazetoj.



RELEGANTE KLASIKAĴOJN (sekvo)

*Daŭrigante la relegadon de la **Fundamenta Krestomatio**, mi alvenis al la longa artikolo "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia". Ĝi estas teksto laŭtleĝita de de Beaufront sed verkita de Zamenhof sub la pseŭdonomo Unuel (Li ĝin elektis por signifi, ke la opinioj esprimitaj estas tiuj de unu el la esperantistoj, ne stampitaj per la aŭtoritato de la Majstro).*

Tiu teksto konsistas el mirinde logika argumentado, kiun ĉiuj esperantistoj devus ĉiam gardi en sia memoro, por esti ĉiam pretaj refuti la senfundamentajn dirojn de niaj kontraŭuloj. La tuto estas leginda kaj releginda. Mi notos nur kelkajn punktojn.

Zamenhof faris distingon inter lingvo internacia kaj lingvo universala. La unua estas lingvo, kiun ĉiu homo uzadus en rilatoj kun alilandanoj, dum li hejme uzas sian nacian lingvon. Oni diras, ke Zamenhof mem hejme parolis pole, kvankam lia tuta familio estis esperantista (kaj ili ĉiuj estis sufiĉe kapablaj esperantistoj por ne bezoni konstantan ekzercigadon en la praktikado de la lingvo).

La dua estus la unika komuna lingvo de ĉiuj homoj en la mondo.

Lingvo internacia jam ekzistas kaj funkcias por ni esperantistoj. Lingvo universala estas, kaj ankoraŭ tre longe estos utopio. Malmultaj estas la esperantistaj familioj, en kiuj la infanoj akiras la praktikon de esperanto kiel hejma lingvo (sed ili estus ankaŭ trudataj de la eksteraj cirkonstancoj praktikadi nacian lingvon). Ĝis nun eble nur unu homo, nome Lanti, vera prototipo, sin sentis pli hejme en esperanto, kaj ĝin uzadis pli senerare ol sian gepatran lingvon. Ĉu do ni devas forĵeti tiun ideon pri unika mondlingvo kiel nerealigeblan kaj nerealigindan ? Unuel mem donis respondon al tiu demando :

"Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo."

Ni rimarku, ke tiuj vortoj estis elparolitaj de de Beaufront en kongreso de la Asocio Franca por la progresado de sciencoj, en 1900, do longe antaŭ la apero de la sennaciisma doktrino de Lanti. Tiu doktrino jam troviĝis kiel ĝermo en la frazo de tiu, kiu volis esti ne majstro, sed nur iniciatoro. Tial ni povas diri, ke la sennaciisto Lanti estis fidela disĉiplo de la homarano Zamenhof.

PERDOJ KAJ PROFITOJ

En mia longa vivo mi konis plurajn tre bonajn, tre kapablajn esperantistojn, kiuj subite aŭ iom post iom deflankiĝis de la movado kaj ĉesis la praktikadon de la lingvo. Kiel Kabe ili malaperis. Mi konis ankaŭ multajn entuziasmajn komencantojn, kiuj post promesplena unuagrada kurso laciĝis kaj rezignis. Kaj mi renkontis simpatiajn personojn, kiuj diris: "Ha! Esperanto! Bonega afero! Iam en mia juneco mi komencis lerni ĝin. Mi ankoraŭ memoras kelkajn vortojn, sed mi preskaŭ ĉion forgesis."

Tiel ĉiujare la varbado de novuloj estas almenaŭ parte kompensata per la perdo de kelkaj, ĉu malnovaj, ĉu freŝbakitaj. Kiel la Danaidinoj, ni vane penadas plenigi senfundan barelon. Al la ĉiama demando: Kiel varbi novajn anojn?, ni devas aldoni jenan problemon: Kiel konservi ĉiujn jam varbitajn?

Ni scias proksimume, kio malhelpas la varbadon precipe de gejunuloj. Eble ni malpli konscias pri tio, kio forigas el niaj vicoj tro multajn kunulojn. Ni devas meti antaŭ ni la demandon kaj provi analizi ĝin. Kaj fari nian memkritikon. Ĉu niaj grupkunvenoj estas sufiĉe viglaj kaj interesaj? Ĉu ni tro ofte dormemas, ronronas, harfendadas pri priesperantaj temoj? Ĉu ne estus necese eliri el nia fermita rondo, aŭdace montri ekstere nian vivkapablon en peresperantaj efektivigaĵoj? Sendube tio estas nur svaga teoria programo, sed serioza pripensado devus trafi konkretajn celojn, difini precizajn taskojn. Eble ili povus mobilizi niajn anojn, vipi ilian latentan agemon, ĉefe ĉe la junaj, kies natura agresemo ne trovas sufiĉan uzadon en niaj tro ofte dormemaj kunvenoj.

Bone estas kulturi la mirindan ilon, kiu estas nia lingvo. Tion ni faras en **Laŭte!** en **Sennaciulo**, en **Sennacieca Revuo**, en ĉiuj esperantaj periodaĵoj kaj en nia literaturo. Sed tio restas inter ni kaj ne tuŝas la eksteran publikon. Kiel pruvi al ĝi, ke ni

povas servi? Jen estas la demando, kiun ni prifosu.

Mi trovas jam respondojn en la ekzemplo de kelkaj aparte viglaj grupoj, kaj en gazetoj kiel **SAT-Amikaro** en Franclingvio, kiuj provizas nin per nacilingvaj inform-artikoloj. Ni klopodu por aperigi tiujn informojn regule en lokaj aŭ regionaj ĵurnaloj, kaj ni ĉiufoje informu ilin pri niaj grupkunvenoj kaj pri ĉiuj esperantistaj manifestacioj en la urbo aŭ regiono. Jen estas propagandaj taskoj, kiujn ni povas proponi al agemuloj. Per ili ni trafos du celojn: varbadon per informado, kaj konservadon per aktiveco.

KAŜITAJ TREZOROJ

Kiel ĉiu alia, nia juna lingvo (cent jaroj por lingvo estas ja ekstrema juneco), nia juna lingvo, do, posedas sian propran karakteron, kiun ni devas asimili en praktikado. Ĝi enhavas ankaŭ latentajn eblojn ankoraŭ ekkonotajn, eĉ ne suspektitajn. Estas tasko por ni esperantistoj ilin elfosi el la apenaŭ eksplorita grundo kiel el mino de kaŝitaj trezoroj. Por tio ni strebu pensi senpere en la lingvo internacia.

Tio estas relative facila en spontana parolado aŭ en originala verkado. Tiam oni povas sin deligi de la nacilingvaj kutimoj. Sed en tradukado necese oni pasas tra la nacia formo. Tiam necesas, sub la supraĵa aspekto de la vortoj kaj esprimoj, eltrovi la fundan sencon, kaj esprimi ĝin per la propraj rimedoj de esperanto. Se ni tradukas laŭvorte, pro la multaj naciaj idiotismoj, ni ricevas nekompreneblaĵojn. Al ĉiu nacilingva esprimo aŭ parolturno konvenas eltrovi esperantan ekvivalenton. Ne ĉiam facile!

Feliĉe povas gvidi nin la verkoj de Zamenhof, unuavice la **Proverbaro**, kaj tiuj de la bonaj aŭtoroj. Kaj feliĉe povas helpi nin, ĉiamajn lernantojn, ankaŭ la instruaj libretoj de sindonemaj spertuloj:

Faŭlhaber: **Ne tiel, sed tiel ĉi**

Lentaigne: **Kiel diri? / Tiel diru!**

Bernard kaj Ribot: **Falsaj amikoj en esperanto**

Speciale por franclingvanoj:

Bourgois: **Proverbaro franca-esperanta / El la fluo de l'interparolo / Esprimaro franca-esperanta.** (Senpaga reklamo)

* *

*

NIKOLIN'

ALKROĈE AL LA VIVO

mi brajlos
humuron
kaj teneron
en velon
unuspecan

se humuro iras
en duba soleco
ĝi iĝas iom post iom
vojo vakua kaj flika

se tenero iras
en butero beateco
iom post iom
ĝi grizigas
posedeme engluigas
etiĝas
agonias...

sed se hazarde
jen humuro
taŭzetas teneron
per aeretoj
per frapetoj
kaj se hazarde
jen tenero
aŭdacas porti humuron
en visceroj
lucidaj kaj liberaj

Jen la Vivo
eksaltas,
fervorega, oferema
simpla kaj senkulpa.

Esti regata de la beleco
sed ne voli regi ĝin.
Kaj same pri la tenereco

Ni nepre devas scii
plej precize
pri intersanĝterenoj.
Rifuzi dispartigon
tie kie ĝi ne estas.

Ni kantu
ni multobligu la belecon
en la libereco.
Tiel ni travivos ligecon
en la diferenco.

ATENDI
nek ion
nek iun

KAJ TAMEN
antaŭvidi ĉion

KAJ TAMEN
atendi ĉiujn

Tenereco kaj plezuro
ne divideblas.
Ĉe intersanĝo
ili multobligas.



LA NOVA STATUTO DE LA HOMO

verkita de **Thiego de Mello**

Artikolo 1. Estas dekretite, ke, ekde nun, la vera vivo ekzistas kaj, kun la mano en la mano, ni ĉiuj laboros por ĝi.

Art. 2. Estas dekretite, ke ĉiuj tagoj el la semajno, eĉ la plej grizaj, rajtas fariĝi oraj dimanĉaj matenoj.

Art. 3. Estas dekretite, ke, ekde nun, la homo ĉiam kredos je la homo, kiel la palmo fidus la malpezan venton.

Art. 4. Estas dekretite, ke la homoj estas liberigitaj el la jugo de la mensogo.

Art. 5. Per nepra dekreto, estas novstarigita la daŭra reĝlando de la justeco, kaj la ĝojo estos klara flago, kiu, por ĉiam, flirtos en la spirito de la homo.

Art. 6. Estas permesite, ke la ĉiutaga pano estu por la homo la marko de la ŝvito, sed ĝi havu precipe la varman guston de la korinklino.

Art. 7. Estas dekretite, per difino, ke la homo estas besto, kiu amas : pro tio li estas bela, pli bela ol aŭrora stelo.

Art. 8. La mono neniam plu povos aĉeti la sunon de la venontaj matenoj : ĝi transformiĝos en fratecan spadon, kiu defendos la kantraĵton kaj la feston de la tago, kiu alvenas.

Fina artikolo : Estas malpermesita la uzo de la vorto : libereco, kiu estos forigita el la vortaroj.

Ekde nun, la libereco estos io klara kaj vivanta kiel fajro, rivero kaj ĝia restadejo estos por ĉiam la koro de la homo.

El la franca : **Michèle Freud.**

*El viaj okuloj tre bluaj
Spegulas sin loge la mar'.
Mi vidas en ili sekretojn
Pri amo kaj nobla far'.*

*En viaj okuloj tre bluaj
Mi sentas min via marist'.
Mi sinkas gajkore algrunde
Kaj dronas sen ia rezist'.*

PRO VIAJ OKULOJ

*Pro viaj okuloj tre bluaj,
Mi revas min via pirat'.
Vi armas min kontraŭ la fridon
Kaj kontraŭ la vanton de l'ŝtat'.*

Hagen Hirte

Korejŝa A.O.

MALFERMITA LETERO AL UNESKO

Nuntempe nia civilizacio troviĝas per vizaĝo kontraŭ vizaĝo antaŭ la minaco de memneniigo. Sendube, la minaco de neniigo ĉiam havas konkretan personigan sencon de la persona respondec. Pri tio ĉi neniam oni povas forgesi.

Tamen, ĉar la minaco de neniigo estas diversflanka (la termonuklea, ekologia katastrofoj), estus eraro redukti ĝian teruran sumon simple al intrigoj de iuj malicaj fortoj kaj respiegulus supraĵan, fenomenologian (evoluisman) metodon de aliro, kiu farus tiujn problemojn praktike nesolveblaj.

Multaj faktoj konvinkas, ke tiu ĉi situacio, antaŭ kiu troviĝas la nuntempa civilizacio, estas laŭleĝa rezulto de la spontana, senkontrola, blinda evoluo de la homa kulturo, resume de la civilizacio mem, kiel planeda fenomeno.

Tiamaniere, la sola radikala rimedo adekvata al tiu ĉi problemo estas la rimedo de la kulturo mem.

Maturiĝas akra neceso je la SCIO, kiu reflektus ontologie plene la nuntempan civilizacion, ĝian kulturon kaj ankaŭ tiun idealon, al kiu la civilizacio devas konformiĝi por resti viva.

Politikaj rimedoj (aktivado de la volo de la popoloj) estas necesaj por solvado de tiu ĉi problemo. Tamen, ili prezentas per si mem nur eksterajn kondiĉojn, kiuj devas garantii al la kulturo la plej favorajn kondiĉojn por solvado de la taskoj vivgravaj por ke la civilizacio restu viva.

Al kiaj kondiĉoj, laŭ vidpunkto de la aŭtoro, SCIO, kiel produkto de la kulturo, devas konformiĝi, por ke ĝi povu iĝi la rimedo revenigi la civilizacion el la ekstrema stato, en kiu ĝi nun estas, al normaliginta, sendanĝera por si stato ?

1. SCIO devas esti sinteza, sumiganta evoluon de la nuntempa civilizacio kaj de ĝia kulturo.

2. SCIO devas reflekti la civilizacion kaj ĝian kulturon entute, t.e. ĝi devas esti universala kaj, samtempe, efika.

3. SCIO devas esti demokratia, atingebla, de intelekta vidpunkto, por ĉiuj homoj de la Tero, kiuj estus kapablaj, rezulte de kompreno de tiu ĉi SCIO, eksenti sian tutplanedan unuecon kaj, samtempe, estus kapablaj por konscia, aŭtonoma, socia kaj kultura ago, sendependa de ideologiaj centroj. La lasto estas necesa, por ke la individuo estu fideble memizolita de socia-ŝovinismaj demagogoj de ĉiuj specoj, kiuj estas plej ofte maskiĝintaj kaj iufoje troviĝas ĉe direktilo de politikaj

kaj aliaj potencoj.

4. SCIO devas esti scienca kaj reflektas realan aranĝon de la civilizacio kaj trovas idealon en realon, sed ne altrudi al ĝi apriorajn idealojn, t.e. montri, kiaj estas la civilizacio kaj kulturo, fakte.

Ĉiuj tiuj ĉi tranombritaj specifikecoj de la SCIO ne povus aperi, se la scio mem ne estus eltrovita de la aŭtoro enkadre de la ONTOLOGA MATERIALISMO jam en 1974a jaro.

Tiu ĉi scio estis eltrovita rezulte de senkompromisaj, honestaj serĉadoj de la vero kaj nur la vero, sed ne rezulte de la pragmata, eĉ nobla, celo.

La aŭtoro ne tuŝos la kaŭzojn, sekve de kiuj la scio ne povis trovi sian vojon al la malfermita gazetaro kaj, tiamaniere, komenci, pli ol 10 jarojn pli frue, la solvado de la urĝaj taskoj starantaj kontraŭ la civilizacio en malpli akra formo ol nun. En mala okazo, ni devus tuŝi la temon de senproprigo de la scio, kio forkondukus flanken de bezono de nia tempo, laŭ opinio de la aŭtoro.

La scio estas spacmodela (ontologia) kaj ĝi estas sube prezentita kiel universala ontologia modelo de la KOMUNUMA SISTEMA. La kerno de tiu ĉi modelo estas universala ontologia modelo de la KULTURO.

Kurte pri la enhavo de la scio oni povas diri jene :


1. La universala modelo de la komunuma sistemo estas strukture identa al la universala modelo de la HOMO, kio servas kiel motivado de la tutplaneda humanismo.

2. La subsistemoj de la universala modelo (la socia, la kultura, la ekzistenciala) estas elektitaj ne hazarde. Al ĉiu el la subsistemoj estas ligita unu aŭ du interaldonitaj funkcioj de la adaptado. La funkcio de la transformo de la ekstera medio estas ligita kun la socia sistemo. La funkcio de diferencigeco de la ekstera medio estas ligita kun la kultura sistemo. Al la ekzistenciala (biologia) sistemo estas kunligita funkcio de diferencigeco kaj transformo de la propraj statoj.

3. Tiamaniere, necesaj kaj sufiĉaj kondiĉoj de pluvivado de la Komunuma sistemo (la homo) troviĝas klarigitaj. Kriterio de ili estas ontologia kompleteco de la sistemo, t.e. ekzisto de la plena sortimento de la funkcioj de la adaptado.

4. La universala modelo de la kulturo, esprimita per la "neŭtralaj" metodologaj terminoj, samtempe estas la modelo de pensado kaj de la "scienca objekto". Alivorte, ĝi prezentas per si mem la universalan scion, en kiu, kiel en spegulo, reflektiĝas

ONTOLOGA MODELO DE LA KOMUNUMA SISTEMA (HOMO)



(Korejŝa A.O. 1973j.)

1. Rolaj strukturoj (normoj, valoroj, ideoj)
2. Kulturo-tipo (maniero de pensado)
3. Ekzistencialaj strukturoj (instinkto de sinkonservo, instinkto de daŭrigo de gento, emocioj).

la tuta intelekta mondo de la homo - lia estonto, estinto kaj, plej grave, lia estonto.

La kulturo, prezentita per la universala modelo, t.e. reflektiganta en ĝi tute, akiras kapablecon normigi sian nunstaton, havante antaŭ si tutecon, kiel idealon. Ĝi akiras, tiamaniere, eblecon de ece senlima evoluo, evitante siajn reduktitajn, senelirejajn formojn.

La tipo de la ontologie plena modelo de kulturo estas tipo de la Kulturo de la epoko de la Renesanco, kiu estas sintezo de la Kulturo de la Antikveco kaj de la Kulturo de la Mez-epoko.

Sekve, spacmodela, kaj, tiamaniere, demokratia scio plenumi, sur la bazo de la tutplaneda humanismo, sian taskon laŭ konservado de la civilizacio kontraŭ memneniigo.

La rimedo por tio ĉi, laŭ penso de la aŭtoro, estas larĝa disvastigo de la universala scio sur la planedo, sendepende de ekonomia, kultura kaj socia evoluo de ĝiaj regionoj. La tempo alpaŝas por elekto inter la vero kaj la demagogio, inter vivo kaj morto.

Sola racia, honesta vojo en tiu ĉi situacio estas malferma publikigo de la universala scio, kiu kaŭzis transiron de la nuntempa fenomenologia civilizacio al la estonta ONTOLOGA CIVILIZACIO.

28.4.86j.

Paŭlo ELUARD

Tradukis **Renato G.**

("Lastaj amaj poemoj")

UNUSOLA RIDETO

*Unusola rideto vetbatalis
Ĉiun stelon al l'altiganta nokto
Unusola rideto por nia paro*




*Kaj lazuro en ciaj ravitaj okuloj
Ĉe la maso de la nokto
Trovis sian flamon en miaj okuloj*

*Ni vidis pro bezono scii
La altan nokton krei la tagon
Sen ke ni ŝanĝu aspekto.*

EL LA FUNDO DE L'ABISMO

*Nia duo estas la unua nubego
En l'absurda vasteco de l'kruela feliĉo
Ni estas la venonta freŝeco
La unua nokto de ripozo
Kiu malfermiĝos sur vizaĝo kaj okuloj novaj kaj puraj
Neniu povos ignori ilin.*

ONTOLOGA MODELO DE LA "SCIENCA OBJEKTO"



LOGIKA MODELO

(L.M.) (Korejŝa A.O.1975j.)

Strukturo de la "scienca objekto", pensado, kulturo, esprimataj per la metodologiaj terminoj - estas sama.

ONTOLOGA MODELO

(O.M.)

Strukturo de la "scienca objekto", pensado, kulturo, esprimataj per la metodologiaj terminoj - estas sama.

Libera kaj feliĉa

Kiu povas difini la feliĉon ? Kiu senco povas esti donata al ĝi ? Oni diras pri iu, ke li estas feliĉa aŭ malfeliĉa, pri alia, ke li elserĉas la feliĉon. Oni parolas pri la sukceso de iuj kaj pri la malsukcesoj de aliaj.

Mi tralegis multajn librojn rilatajn al tia temo. Maloftaj estis tiuj, kiuj montras sufiĉan klaron aŭ estas simple skribitaj, en ĉiutaga lingvo, por ĉiuj.

Tamen, la serĉo de feliĉo koncernas nin ĉiujn, ĉar fakte ĝi estas nenio alia ol la senco de vivo ! Feliĉe travivi sian vivon, tio estas la supro kaj la deziro de ĉia iomete inteligenta homo.

Psikiatroj kaj psikologoj jam proponis vivmanierojn kaj solvojn dum tiuj lastaj generacioj, sed iliaj densaj kaj profesiaj prezento kaj stilo trafis nur limigitan rondon. Ĉiaj filozofoj faris la samon per malfacila skribo.

Malgraŭ ĉio jam dirita kaj skribita pri tio, esti feliĉa ne konsistas el multo. Estas ĉiam la samaj fenomenoj, kiuj senĉese revenas kaj regas nian tutan vivon. Iliaj observo kaj praktiko ebligas havigi maksimuman aplikon kaj estas je la dispono de ĉiuj kun iom da volo kaj pripensemo.

Certe estas pli facile atingi tion, kiam oni estas en bona farto kaj libera de materiaj kaj monaj zorgoj. Tiaj demandoj estas vanaj por tiuj, kiuj devas ĉiam batali por havigi al si sian ĉiutagan porvivaĵon.

En tiu nia epoko de novaj sciencaj kaj teknologiaj eltrovoj, kiuj kreas novajn fakajn klasojn, oni povas esperi, ke tiu legado alportos oksigenan ekblovon kaj estos la risorto por nova mem-ekzameno de tiuj, kiuj iom post iom enabismigas en ĉagrenon.

Vivi en socio supozigas obeon al multaj interkonsentoj, leĝoj kaj tradicioj faritaj de kelkaj, la plej fortaj, por ke ĉiu travivu sian vivon laŭ la maniero, kiun ili estas pensintaj, laŭ iliaj personaj aspiroj, kiujn ili volis aplikigi al la loĝantaro, devige se necese. De tiam la homo perdis sian liberan penson. Li estis devigata vivi ne kiel li intencas sed laŭ aliulaj indikoj, de la lulilo ĝis la tombo. La plimulto jesis. Malliberejoj estas plenaj de leĝrezistantoj kaj multaj aliaj forkuras por ne esti kaptitaj. Laŭ la psikiatroj ni estas preskaŭ ĉiuj psike malsanaj. Kiel do impona estas la kohorto de la malkontentaj, amaraj kaj neŭrozaj ! Kiaj abundaj artefaritaj aĵoj kaj rimedoj necesas al ili, por ke ili konu kion ili kredas la feliĉo : sia feliĉo !

Estas ofta opinio, kiu klasigas la nekredanton aŭ la ateiston kiel materialiston rifuzantan ĉian referencon je spirita pluvivo, ankaŭ nomata animo. Fakte li estas tiel difinita de si mem kaj de siaj samtempuloj, ĉar li praktikas neniun religion, frekventas neniun sekton, rifuzas ĉian dogmon kaj forĵetas la dian bildon al li proponatan. Li taksas sin kapabla pripensi sola pri siaj origino kaj destino kaj konkludi laŭ kiu ŝajnas al li la plej akceptebla per plena penslibero.

La materialisto ne nur zorgas pri terĝuoj sed li ankaŭ lernas la spiritproblemojn, tiel li energie malkonfirmas siajn kritikaĉantojn.

Ĉiu vivo devas esti harmonia por esti feliĉa. Se la preĝo al la dioj estas la karakterizaĵo de la religioj, la pripenso, la medito estas tiuj de la penso. Kiu persono ne serĉas sencon al sia vivo kaj kiu trovas la respondon ?

Ni vivas pro nura hazardo, ĉar ni estis kreitaj sen nia konsento. Estas do nia intereso partopreni la vivon en la plejeble bonaj cirkonstancoj. La evoluo de la diversaj specoj donis al ni tiun eblecon, diferencigante nin de la animaloj pro naskiĝo kaj kresko de konscio, penso kaj intelekto, tiuj elementoj, kiuj povas feliĉigi aŭ malfeliĉigi nin laŭvole. Ni elektu tuj la unuan solvon ! Jes ja estas la deziro de ĉiuj, sed kiom inter ni sukcesas ?

La konkura mondo estas la nia, vera homa ĝangalo, kie ĉiu serĉas plivalorigi sin mem, dispremante la alian, kaj kie kompato kaj amo ne plu ekzistas. Mono kaj korupto regas ĉion ; ni laboregas, ni volas amuziĝi, ĝuegi. "Mi ne havas tempon" estas modrekantaĵo. Kiu ankoraŭ haltas por spiri kaj pensi ? Tamen tie estas la ŝlosilo al feliĉo. Ni spertus pacon, se regule ni izolus nin kaj se ni pripensus la fundamentajn principojn, kiuj regas nian ekziston. Ni eliminus multajn ricevitaĵajn antaŭjuĝojn kaj falsajn opiniojn, vidus alian aspekton de la diversaj aferoj: la kaŝitan flankon ; okazigus aliajn reagojn, pri kiuj eble ni neniam pensis kaj kiuj povus tute modifi nian vidmanieron en pozitivan kaj favoran sencon. Ĉu la aliaj estas ĉiam kulpaj pri niaj malbonŝancoj ?

Ni provu rigardi en nian internon, ne por pravigi niajn tutajn agojn sed por serĉi la kialon de niaj motivoj. Nu, ni malkovros, pro kiuj falsaj argumentoj ni kondukis nian vivon kaj ni ĉesos akuzi niajn kunulojn. Tiam ni direktos mem nian estontecon, ni batalos kontraŭ la estintecajn traŭmojn, tiujn de nia infanaĝo, familia, religia kaj socia vivo por ekiri kun plej pura kaj senpartia bazo, kiu ajn estas nia aĝo ! Por atingi tiun serenon, estas grave, ke ni trovu internan trankvilecon, estu

en harmonio kun la ĉirkaŭa mondo, silentigu niajn venĝosent-ojn, estingu nian indignon, kvietigu nian koleron, ekiru denove.

Kial ĉiam ni revenu al la estintecaj agoj kaj diraĵoj, senti nin kulpaj, dum nenio povas ŝanĝi tion ? Tamen ni ne forgesu, ke certaj faktoj kaj gestoj povas esti gravaj por la estonteco : ni konkludu mem kaj direktu nian konduton laŭ nia nova saĝo !

Ni memoru nur la bonajn momentojn de la estinteco ! Ni ne pensu tro pri la estonteco : nia ekzisto kaj tiu de la aliaj povas tuj ĉesi ! Kiu scias kio nin atendas post unu horo aŭ morgaŭ ? Tamen, kial ne esti optimismaj kaj priatenti tiun estontecon fide kaj iomete indiferece sen tro malproksimaj projektoj ?

Se ni tion decidus, ni estas jam sur la vojo de la sereneco, sed necesas, ke ni forgesu niajn antaŭajn malfeliĉojn, ekzameni en nia konduto kio okazigas la koleron de niaj samcivitanoj. Ni devas nin konvinki, ke ni serĉas nian ekvilibron per la harmonio por esti feliĉaj. Serĉi la feliĉon dum nia vivo estas la plej granda formo de inteligento.

La homo estas feliĉa, kiam liaj deziroj plenumiĝas, se ne, li estas spitata kaj travivas malagrablan senton. La ideala feliĉo devus esti la tuta manko de ĉia deziro... sed nur la morto povas alporti al ni tian senton !

La evoluaj leĝoj favoris al ni perfektan cerbon, kiu ebligas al ni vidi nian ĝustan lokon en la kosmo, kies konsista parto ni estas, kiu ebligas al ni pensi kaj donis al ni konscion. Nu, ni povas direkti nian penson kiel ni deziras ĝin. Dank'al tiu donaco ni povos komenci vastan taskon, neniam finitan, ĉiam renovigotan : la serĉon de la perfekteco, la memkonon. Ni ne hezitu : ni eniru nian mion, ekzameni nin, analizu niajn motivojn, serĉu la kialon de iaj aĵoj, revenu al nia infanaĝo, trovu tion, kion ni estis enfosintaj en la sekretan profundon de ni mem. Ni ne plu friponu, hontu. Male, ni estu klarvidaj kaj rekonu niajn erarojn.

Sciante nun tion, kio nekonscie nin turmentis, iom post iom ni forpelos niajn antaŭjuĝojn, ni vidos la mondon alimaniere, ni lernos nin regi, nia karaktero iĝos pli forta, ni spertos la feliĉon.

Tial ni estos lernintaj direkti nian penson al pozitiva deziro, tiu, kiu konigos al ni la ĝojon, ĉar povas esti neniu alia vivsenco ol tiu. Ni akceptos la morton kiel naturan vivfenomenon kaj ne kiel finatingon, ĉar ĝi estas eterna nekonscia daŭrigo de tio, kio ni estis antaŭ nia naskiĝo. Ni dankos tiun konscion, tiun direktatan penson, kiuj ebligis al ni videti la misteron de la eterno kaj de la infinito, kies ero ni estas. Neniam ni for-

gesos, ke la tempo estas senmova kaj la vivo nur iluzio.

Por atingi tion la vojo estos longa, ni devos provi kompreni la aliulajn motivojn kaj ami, konsenti, ke ne ĉiuj rezonas kiel ni, ke iliaj sentokapablo kaj spiritostato diferencas. Ni lernos toleri ilin tiom longe, dum ili ne prezentas danĝeron.

Ni posedas sensojn ; ni lernu utiligi ilin, esploru rigardu, aŭskultu, estu scivolaj pri ĉio, observu nin mem kaj niajn intencojn. Tiam ni estos surprizataj malkovri multajn aferojn, kiuj ŝajnis al ni negravaj. Ni estu la kolektujo de ĉio, kion la mondo ofertas al ni kaj ni estas ravataj. Ni vivu konscie, ĝuu la nunan momenton, interesiĝu pri ĉio, pensu kreige, rifuzu senmovon, ne ĉiam sence babilu la samajn estintajn rakontojn, ripetu, ke la aliulaj opinioj kaj paroloj ne povas influi nin. Ni estu personaj, ni ne permesu al kunuloj domaĝi eĉ eron de nia ĝojo aŭ esti la kialo de malagrabaĵoj : ni sendu ilin en la malproksimon, malpermesu al ili invadi nian spiriton.

Ni observu nin, malakcelu niajn agojn ; ne plu da vana rapidemo, ĉar ni ne forgesos, ke ĉiam estas bona tio, kio prudente malrapide estas farita. Tian principon ni aplikos al tiuj ĉiutagaj agoj, kiuj malutilas al ni kaj estas domaĝaj por nia sano.

Estante pli optimistaj, ni ekiros denove bone en la vivo, retrovos nian fidon, rigardos la aliajn sen timo sed kun respekto. Ni ne plu estu tro seriozaj, iam ni ridu pri ni mem, estu objektivaj, ĉar ĝenerale la plimultaj faktoj, kiuj ĉagrenas nin, estas ja banalaj. Ni neniam forgesu, ke la tombejoj estas plenaj de homoj, kiuj kredis sin necesaj !

Neniam ni estu la viktimoj de kiu ajn aŭ oferu nin. Komprenable, ni estu servemaj kaj afablaj, sed ni ne forgesu, ke ĉiu havas sian propran vivon ; ĝi estas unua kaj devas esti plene vivata laŭ la eterna leĝo kaj niaj scio kaj kapableco.

Por plene vivi ni ne devas nin kaŝi, male ni renkontu homojn kaj ĝoje ekhavu la necesajn kontaktojn, ĉar estas la socio, kiu regas la vivon de la homa estulo. Kial fari tiom da rimarkoj kaj kritikoj ? Cu ili estas ĉiam necesaj ? Riproĉoj estas plej ofte vanaj, ni evitu ilin, ĉar ili povas alporti al ni nur malamikecon.

Ni ne estu agresantoj, ne parolu malame, ne hontigu niajn similulojn, ĉar ili malfacile pardonas nin. Kontraŭe ni ĝoju pri ilia feliĉo. Ĉu ni neniam pensis pri la ĝojo, kiun eta agrabla parolo havigas al niaj amikoj ? Ni ne plu estu ĵaluzaj kaj avidaj, alie ĉu ni estus pli riĉaj kaj feliĉaj ? Estas multaj faktoj, kiujn neniam ni povos ŝanĝi, kial do nin psike torturi pro tio ?

Ni provu harmonie vivi kun niaj najbaroj, ni ŝanĝu nian vidmanieron. Ĉu eble ili neniam pravos, sed nur ni ?

Ni evitu la revengojn, ĉar plejofte ili estas malutilaj ; kontraŭe ili venenas niajn rilatojn. Ĉiam ni memoru la amaran emon, kiun lasas la venĝo.

Jam de longe spontano estas forgesita. Hipokriteco estas ofte la rezulto de nia eduko kaj de la nuna socio. Ĉu ni ne estus pli feliĉaj, se foje ni forgesus iomete ĝentilecon kaj bonedukitecon por fari kion ni deziras, lasante la aliajn al siaj antaŭjuĝoj kaj kritikoj, pri kiuj ni ridetus ?

Ni malkonsentu ĉian identigon aŭ religion, male ni estu ĉie hejme sendependaj sed neniam indiferentaj pri la teraj problemoj, kiam ili estas justaj kaj indaj.

Sen esti malmodestaj, ni devas ĉiam havi bonan opinion pri ni mem, ĉar kiel alie ni povus ami la aliajn ?

Ni konu la ĝojon doni, se ni havas tiun eblecon, ĉar estas ĉiam homoj pli malriĉaj ol ni, sed neniam ni forgesu la kohorton de l'profitantoj kaj malhonestuloj, kiuj senĉese kaŝe observas nin.

Esti avidaj kaj ĉiam voli posedi pli ol la necesajon ne alportas feliĉon sed nur internan maltrankvilecon.

Homoj ŝatas paroli pri si mem kaj siaj problemoj. Ĝenerale ni ne interesas ilin. Ni lernu do aŭdi sen lasi ilin trouzi.

Ni ne permesu al aliaj malestimi nin ; ni reagu laŭ niaj rimedoj kaj evitu ĉian malforton kontraŭ niaj malamikoj. Precipe ni ne forgesu jenon : ni ne malestimu, se ni ne volas esti malestimataj.

Ni lernu trankvile ekzameni kaj solvi ĉiujn problemojn, kiuj nin sturmatakis, uzante saĝe ĝustajn vojojn, parolojn kaj agojn. Gravus, ke ni akceptu la neŝanĝeblajn viveventojn. Batali kontraŭ maljunecon estas vane, sed nia spirito povas resti juna, kiam nia korpo kadukiĝas.

Ni neniam forgesu, ke rekoni niajn pekojn estas grandega formo de klarvido.

* * *

Konklude, ĉu ni estas pretaj por tiu vivoŝanĝo, tuj iĝi malpli ofendigeblaj kaj vengosentaj, ne plu vivi laŭ aliula opinio ?

Kial ni fine ne provu, se vere ni volas iĝi liberaj kaj feliĉaj, direktante mem nian destinon ?

ĈIES VOĈO

KIAL FORIGI ĈAPELOJN ?

De pluraj monatoj, mi legis en **Laŭte** plurajn artikolojn pri malfacilaĵoj de Esperanto, precipe pri ĉapeloj. Mi ne komprenas iliajn kialojn.

Antaŭ pluraj jaroj, mi aĉetis internacian skribmaŝinon : germana firmao, jugoslavia fabriko, franca klavaro. Mi tre facile povis ĉapeligi literojn, ĉar la " ^ " ne movas la paperon, do la litero post tiu signo estas aŭtomate ĉapelita.

Antaŭ du jaroj, mi aĉetis internacian komputilon : usona firmao, irland-fabriko komputilo, koreuj-fabriko ekrano, japan-fabriko presilo, kaj francaj programoj. Tre facile ni povas ĉapeligi literojn, ĉar la priteksta programo aŭtomate kunigas la ĉapelon kun la sekvanta litero. Esperantlingve, oni povas ankaŭ uzi tiujn rimedojn.

Laŭ mi, en estonto, malfacilo ne estos en presado aŭ tajpado, ĉar perkomputa eldono disvolviĝos. Sufiĉos verki programojn por esperanta presado, kiuj estos multobligataj malmulte koste. Mi ludis esperantigi pritekstan programon por komputiloj "Apple II" ; mi povas sendi ĝin al ĉiu deziranto. Se iu havas similan programon por IBM, mi plezure ricevos ĝin.

Mi pensas tamen, ke malfacilo estos en la interŝanĝo : post la tajpado per iu komputilo, ni devos legi, kaj presi, tekstojn per alia komputilo, kaj alia programo, kaj alia presilo. Se ni intencas transsendi tekstojn per telefon-reto, ni devos ĉiuj sendi ilin kun similaj interkonsentoj.

Do, laŭ mi, sufiĉas meti " ^ " post la ĉapeligota litero. Ni povas facile kompreni, ec se ĉiu ĉapelo ne estas super la literoj : Ĉu la ĉapelo ŝanĝas la ĝuon ?

Tiel, ni sekvas Zamenhof, kiu preskribas meti "h" post la ĉapeligotan literon. Tiel, ankaŭ, komputiloj povos facile ordigi vortojn laŭ alfabeto, ĉar " ^ " estos post ĉiuj literoj, do ĉa estos post cz.

Se poste, iu dezirus meti la ĉapelon super la literon, sufiĉus programeto, kaj klasika esperanto reestus.

Konklude, ni povas lasi literojn kun ĉapeloj post ili. Tio estos ĝentileco : kiam la vortoj deziras saluti la leganton, ili senĉapeliĝas. Ĉu ?

Pierre Dieumegard, 8 montée des Marguerites prolongée,

F 13117 MARTIGUES LAVERA

POST 50 JAROJ DA FORLASO DE ESPERANTO

Mi pensas, ke la legantoj estos interesataj de la pripensoj kaj la impresoj de iu, kiu forlasis esperanton dum pli ol 50 jaroj kaj nun reinteresiĝas pri la lingvo.

Hodiaŭ mi pritraktos nur la vortordon kaj la akuzativon. Mi eble poste pritraktos aliajn lingvajn aspektojn, kiuj atentigas min.

Mi estas nova abonanto de "Laŭte!". Mi estas 77-jara Bruselano, dulingva (1). Mi lernis esperanton en 1930 per korespondokurso kun Kdo M. Van Aelst (2). Jam antaŭ la milito mi ne plu okupiĝis pri E-o. Kiam mi pensiuliĝis, mi havis sufiĉe da tempo por reinteresiĝi pri E-o.

Mi miris, konstati kun kia facileco mi povis relegi kaj kompreni esperantan tekston. Kompreneble, mi ne plu havas la idealismon de la juneco nek la entuziasmon de la novvarbato. Mi ĉiam estimas la kvalitojn de la lingvo, sed mi vidas ankaŭ ĝiajn mankojn. La ĉefaj kvalitoj de E-o estas la unuecemo (?) (3) de la reguloj, sen iu escepto, kaj la ĉefa difekto estas, laŭ mi, la manko de regulo rilate la vortordon (V.O.) en la frazo. Mi pli facile komprenas esperantan tekston, kiam ĝi estas skribita de franclingvanoj, ĉar ili skribas siajn frazojn kiel en la franca lingvo (ĝenerale). Ne plu estas same, kiam la teksto estas skribita de iuj nefranclingvanoj, ĉar ili konstruas siajn frazojn kiel en sia gepatra lingvo (ekzistas feliĉe esceptoj!) kiel la akuzativo tion permesas. Atentu! Tio ne volas diri, ke mi ne komprenas la tekstojn de alilandanoj; se ili skribas en zamenhofa stilo, mi tre bone komprenas.

Mi relegis en miaj lernolibroj kaj aliaj libroj (4) ĉion, kio koncernas la akuzativon. Mi alvenas al la konkludo, ke la akuzativo pli malutilas ol utilas al la klareco de la lingvo. La ekzemploj traktitaj en tiaj libroj estas preskaŭ ĉiam frazoj dusencaj kaj fuŝe redaktitaj. Unu ekzemplo inter multaj: balau la polvon sub la lito, ne sub la lito_n (5). Ĉu en la legado de tia frazo oni sufiĉe atentigas la diferencon inter la du vortoj: lito(n)? Ĉu ne estus preferinde diri: elbalau la polvon sub la lito, ne la malon? Ekzistas ankaŭ multaj aliaj manieroj por esprimi tion klare kaj sen dusenco.

Alia ekzemplo: Lo Jocomo citas jenan frazon (6): "malfacilaĵoj_n tion prizorgi tamen multe pli ol kompensis la apartan spertecon kaj prestiĝon de tiuj prelegantoj". Spite plurajn reelgadojn de tia frazo, mi ne sukcesis kompreni la signifon ol legi la francan tradukon.

Kial mi ne komprenis? Pro la nekutima vortordo kaj eraro de akuzativo. Mi skribus la frazon jene:

La sperteco kaj la prestiĝo de la prelegantoj multe pli ol kompensis la malfacilaĵojn de la prizorgado.

La propagando por E-o insistas pri la fakto, ke la V.O. estas tre fleksebla, kontraŭe al la angla lingvo (V.O. tre rigora). Mi kredas, ke la kvazaŭa libero de la V.O. dank'al la akuzativo, estas unu el la kialoj de la malrapida kaj malampleksa disvastiĝo de E-o. Ke la gramatikistoj opinias, ke la akuzativo estas nepre utila por la precizeco de la lingvo, nu bone, sed tio ne signifas, ke oni povas ordigi la vortojn kiel plaĉas al oni. Oni ne devus aserti, kiel oni faras en la lernolibroj (7), ke estas eble ordigi la subjekton, la verbon kaj la komplementon (predikativon) laŭ 6 malsamaj manieroj! Ĉio estas efektive ebla, sed ne rekomendu! En la lernolibro estas dirite koncerne la V.O.-on: la sola regulo, kiu sin trudas, estas la klareco. Sed, ĉu ĉiuj multaj kaj diversaj lingvanoj havas la saman koncepton pri klareco? Ĉu ne estas la klareco de ilia gepatra lingvo, kiu sin trudas en ilia pensmaniero? Jam, inter la franca kaj la nederlanda lingvoj, la V.O. ne estas la sama. Ĉu ne estus preferinde, ke spertaj esperantistoj, sed ne harfendistoj, estus komisiotaj por eltrovi unu novan gramatikan regulon por ordigi la V.O.? Laŭ mi, estus pli simple, kiel por la aliaj gramatikaj reguloj, unu sola regulo por la V.O., ekzemple: La subjekto devas ĉiam antaŭi la verbon kaj la komplemento (predikativo) ĉiam sekvi la verbon. Mi sugestus tion, ne por imiti la francan lingvon, sed ĉar estas la logiko mem. Unu ago komenciĝas ĉiam per tiu, kiu faras ĝin kaj finatingas la personon aŭ la objekton, kiun la ago trafas. Oni eble kontraŭdiros, ke tiam la frazoj estus ĉiam la samaj kaj monotonaj. Tute ne. Ekzemple: 1) La urbestro salutas la kongreson. 2) La kongreso estas salutata de la urbestro. La unua frazo estas esprimo de ago, la dua, esprimo de stato (rezulto de la ago). Fakte, la du frazoj esprimas la samon, alimaniere, kaj la V.O. estas ĉiam: subjekto, verbo, komplemento. Ĉu la dua frazo ne estas pli "natura" ol: "la kongreson salutas la urbestro", kio povus esti konfuzita kun: "La kongreso salutas la urbestron"?

Mi esperas, ke la nefranclingvanoj povas kompreni mian tekston. Mi petas ilian malseveron. Al la komencantoj mi diras: Ne malkuraĝu. Faru kiel mi, sekvu la konsilojn de Faulhaber en la libro "Esperanta Mozaiko", ĉefe je la p. 67: "Observu la infanon, kaj saĝiĝu" kaj p.77: "Nur en la akvo oni lernas naĝi!". Nu, mi saltis en la akvon, almenaŭ figure, kaj skribis tiun ĉi artikolon.

(1) franca, nederlanda. (2) mortis en aŭgusto 1986, 89-jara. (3) franclingve : unicité. (4) Cours rationnel et complet d'Esperanto (1926). Nia lernolibro (FLE) 1932. Lingvaj Respondoj (Z), 1962. Esperanta Mozaiko (Faulhaber), 1966. Lingvaj anguloj (Baronnet), 1981. Paŝoj al plena posedo (W. Auld), 1984. Fundamento de E-o (Z), 1963. (5) Liberté ou Autorité dans l'évolution de l'E-o (Lo Jacomo), 1981, p.248. (6) same, p. 253. (7) Cours rationnel p. 47, kaj p.63

SALUTON AL VOĈO EL AFRIKO

En L! 72 mi legis kun granda plezuro la artikolon de Koffi Gbeglo, kiu rakontas pri du maltoleremoj : tiu de la fetiĉista patro, kiu longe obstinadis, por ke lia filo ne estu instruota en lernejo, kaj tiu de la katolika lernejestro, kiu punis per batoj la lernantojn ne ĉeestintajn ĉe la dimanĉa meso. Du formoj de fanatikeco. La rakonto estas prezentita en simpla bonstila esperanto.

Estas tre dezirinde, ke al ni en okcidento venu tiaj freŝaj atestoj el malproksimaj landoj, malproksimaj laŭ la geografia distanco kaj ankaŭ laŭ la loka kulturo. La kontribuo de nia afrika amiko estas unu el la unuaj ekzemploj de evoluo de nia revueto : ĝis nun, kiel ĉiuj esperantaj organoj, ĝi estis tro ekskluzive inspirita de okcidenta kulturo. Se tiu voĉo el Afriko vekos kelkajn aliajn, L! vere turniĝos al dezirinda tutmondeco. Bonvenon kaj gratulon al Koffi.

VALO

PRI TERORISMO

La celo sanktigas. Pri tio mi cerbumis post la legado de la "vortoj de Maljunulo" sur paĝo 19 de L! 72. Valo finis per la vortoj : "vane, ĉar kontraŭ ĝi, ho ve! nek vi nek mi ion povas"

Nek... nek egalas NI. Ĉu efektive NI ne povas kontraŭi la stultan monavidan kulturon ? Ĉu la fatalismo superas nian volforton ? Ne, amiko VALO !

Se ni volas, tiam ni kapablas kontraŭi eĉ perforte, ĉar la celo sanktigas. El niaj okuloj ekradiu mortigaj ondoj. Ne per ponardoj, sed per akraj severaj rigardoj ni por ĉiam silentigu stultulojn, kiuj asertas, ke la fabrikado de nova papero estas preferinda super reciklado. Mortigu la oniojn, kiuj subtenas fatalpensadon !

Jen mia lasta artikolo por la bulteno LAŬTE. Mi ne plu deziras ricevi ĝin. Valo konvinkis min, ke ankaŭ per la bulteno LAŬTE ni malŝparas arbojn.

PRI TERORISMO KAJ KORSIKIO

La nunaj okazintaĵoj en Korsikio pligravigas la debaton en L! 72. Kiel la partoprenantoj de la debato, mi opinias, ke terorismo estas malbonaĵo, sed ne nur tiu, kiun oni montras al ni.

Mi citas la svison Jean ZIEGLER, membron de la Buroo de la Socialista Internacio, parolantan je sia propra nomo en Gernika (hispana gazeto "El Pais", 27an de aprilo 1987.) :

"Mi konsideras neakceptebla la terorismon kaj la perdon de senkulpaj vivoj, t.e. agadon de politikaj grupoj kaj ŝtatoj, kiam ili ĵetas bombojn en Vjetnamio aŭ Tripoli." S-ro Ziegler eĉ aldiris : "E.T.A. milita ne estas terorista en tiu senco"... "ĝi kredas oponi al ŝtato perforte kontraŭ perforto..."

Mi aldonas, ke ne nur generalo Pinochet estas teroristo, sed ankaŭ tiuj, kiuj helpis lin, same tiuj, kiuj helpis aliajn diktatorojn : Batista, Somoza, Markos, ktp, ankaŭ tiuj, kiuj forbatis liberecedzirojn en Ĉeĥoslovakio, Pollando ktp.

Oni ne sufiĉe atentis, ke preskaŭ ĉiu revolucio, batalo por libero, komenciĝis per terorista agado, eĉ la rezistado al nazismo.

Pri Alĝerio kaj aliaj kiel la eksfranca Hindoĉinio, multaj etnanoj multjare provis diskutojn kun la franca registaro. Ili multe esperis je la franca liberemo por plibonigi la sorton de siaj samlandanoj senperforte. (Ili ankaŭ oferis sian vivon por Francio kontraŭ naziismo ktp.). Sed tio estis vana. La koloniistoj volis nur egalecon pri devo ne pri rajto. Pro tio, libereco estis havebla nur per "terorismo" kaj milito.

Pri Korsikio : Multaj, kiuj sin diras kontraŭkoloniistaj, malakceptas la ideon de interna koloniismo. Korsikio estas eŭropa, do ne estas tie koloniismo.

Se tio estus, Sarlando devus esti franca kaj nur francparolanta, kaj se Barcelono fariĝus franca je Pirenea Traktato, ankaŭ ĉiuj katalunoj devus esti nur franclingvaj.

Oni diros : "Sed vi refaras historion!" Sed vere estas, ke Francio pligrandiĝis je siaj landlimoj (ankaŭ aliaj landoj, ekz. Hispanio), sed malaperigante la lingvojn de la konkeritaj popoloj. Tamen Francio fieras, ĉar Kebekio konkerita de Anglio gardis sian francan lingvon. (Ĉu eble ĝi petos referendumon en la itala Valo de Aosto, por ke tiu ĉi elektu francan naciecon ?)

Mi ne konas la verajn kialojn de franciigo de Elzaco. Eble tiu lando lingve proksima de Germanio volis apartigi sin de Germanio. (Estus ankaŭ Svisoj kaj Aŭstroj). Sed ne dezirante aŭ ne povante esti sendependaj, ili eble elektis volonte Francion (sed verŝajne ne la malaperon de sia lingvo).

Por Korsikio la franciĝo fariĝis perforte. Ankaŭ al Katalunoj kaj Vaskoj oni ne demandis, ĉu ili volas apartiĝi de siaj samlandanoj.

En la insulo Sardlando proksima al Korsikio (ankaŭ lingve proksima) la loĝantoj rajtas lerni, paroli sian etnan lingvon, plie, ankaŭ la malplimultaj katalunoj en la sarda urbo Algero (Alguer).

En Britio, la Kimroj rajtas je sia lingvo, kaj en Finnlando malplimulto rajtas oficiale je la sveda lingvo !

Mi skribis nur pri la lingva problemo, ĉar ĝi estas la plej videbla aspekto. La franca perforto okazas en ĉiuj etnaj aferoj.

Oni ne povas aprobi murdon. Sed terorismo estas ankaŭ ŝtata. La sinteno de Sro Pasqua antaŭ kaj post la murdo de Sro Lafay estis vera provokado.

L.A.

ĈU ILUZIO ?

Mi dankas k-don Deker pro lia reago (L! n-ro 72) je mia letero (L! n-ro 71). Li honeste konfesas : "Jes ja, ni francoj konfuzas naciecon, ŝtatanecon, ktp. Fakte por ni tio ne gravas..." Mi havis amikindon, kun kiu ni ofte promenadis en kamparo. Ve! ŝi neniel povis distingi tritikon de sekalo, hordeon de aveno. Ŝi senĉese konfuzadis ilin kaj diradis tute sincere : "sed ĉu tio gravas ? Finfine ili ĉiuj estas cerealoj!" Tamen - laŭdojn por ŝi! - ŝi ne verkis artikolojn por agrikulturistaj revuoj !

Kion signifas : konfuzi ? "Intermiksi du similajn personojn aŭ objektojn" (2a signifo en PIV). Kaj kial oni intermiksas ? - ĉar malbone konas, ĉar ne havas en sia kapo klaran ideon pri tio kio estas kio. Kutime homoj maltrankviliĝas, eĉ suferas pro okazintaj konfuzoj, kaj ĝenerale, penas ne plu erari. Malofte mi aŭdis, ke iu simple svingas la manon kaj diras : "Jes, mi konfuzas, sed ĉu tio gravas ?"

Mi elektis ekzemplon de iama Rusia imperio (laŭteritorie - preskaŭ nuna Sovetio) ne pro kriterio : trafeco/maltrafeco, sed pro tio ke tiun landon kaj ĝian problemaron (nacian, aparte) mi konas. Prefere ni rakontu pri tiuj landoj, kiujn ni konas. Pri originaleco de usona kulturo dezirinde skribu iu usona kompetentulo, same pri Brazilo, Aŭstralio k.a. Ĉiu lando meritas apartan esploron.

Nacieco (popolaneco) estas fenomeno unuavice kultura, dum ŝtataneco, politika. Pro diversspecaj politikaj kialoj homoj povas ŝanĝi sian ŝtatanecon kelkfoje dum sia vivo - kaj samtempe ĉiam resti si mem. Mi havas geavojn, kiuj naskiĝis kaj tutan

sian vivon loĝas en Galicio*. En la momento de ilia naskiĝo Galicio apartenis al Aŭstra-Hungara imperio, ili do estis civitanoj de la sama imperio kiel multaj hungaroj, slovenoj, kroatoj k.a. Post la Revolucio Galicio estis aligita al Pollando, kaj miaj geavoj iĝis pollandanoj. Ekde la 1939a jaro Galicio aparteni al Ukraina SSR (kaj ĉi-lastas estas parto de Sovetio), ili do iĝis sovetianoj. Trifoja ŝtatanec-ŝanĝo, kaj ili ĉiam restadis en sama vilaĝo ! Certe, la ŝtatanec-ŝanĝado kunportadis ŝanĝojn en ilia vivmaniero (ĉefe, la lastan : ili devis iĝi kolĥozanoj), tamen ĉiam ili restadis ukrainoj (aŭ rutenoj, laŭ malnova terminologio). Kio do estis en ilia vivo pli iluzia : ŝtataneco aŭ nacieco ?

Vi nomis mian leteron "tre naciista" kaj tio montras, ke vi ankoraŭ neniam vidis vere naciistan leteron (mi supozas, ke por vi vorto "naciisto" havas tre negativan sencon. Mi preferas uzi vorton "ŝovinisto"). Ŝovinisto trudas sian nacian lingvon al ekstera mondo (mi al neniu trudas la ukrainan, eĉ ne al mia edzo, kiu estas franco). Kelkfoje kelkaj ŝovinistoj sincere opiniadas, ke ilia lingvo estas la plej bela, la plej evoluinta, la plej "progresema" ktp, ktp. kaj ne trudante ĝin al alinacianoj ili feliĉiĝas ilin kaj gvidas ilin al pintoj de homa civilizacio. Ekzistas do ankaŭ esperantisto-ŝovinistoj, kies slogano estas : "Aŭ Esperanton, aŭ nenion!" Naive kaj ridinde estas esperadi enkondukon de Esperanto pere de registaroj. Sed venos iam tempo kiam oni akceptos ĝin por internaciaj kontaktoj (kaj tion mi plej sincere deziras). Mi konsentas : "la komunikado estas nepre necesa". Permesu aldoni : ne ia ajn komunikado, sed enhavriĉa. Ni devas havi kion diri unu al la alia, komunikante. Nia multnacia kultura diverseco estas garantio de tio, ke komunikado ne iĝos nur priekonomia, pritekna, prikonsumisma, sed ankaŭ vigla kaj ĉiuflanke utila interŝanĝo de kulturaj valorajoj, kiujn ĉiu aparta nacio evoluigis kaj kreis dum jarcentoj de sia historio.

Ĉar viaj gefiloj loĝas en Francio, evidente, viaj genepoj ekvizitos la francan lernejon kaj edukigos en la franca kulturo. Supozeble, ke ili vojaĝados ankaŭ en Madagaskaron kaj tie familiariĝos ankaŭ kun la malagaŝa kulturo. Ili do havas ŝancojn iĝi dukulturaj. Kaj se dank'al vi ili ankaŭ esperantistiĝos, ili iĝos trikulturaj. Kaj ni imagu, ke iu el ili ekinteresiĝos pri la japana kulturo kaj iĝos fakulo pri ĝi. Tia riĉeco povas nur ĝojigi kaj alporti bonon por ili ! Ĉar multkulturaj homoj estas riĉeco de la homaro, dum senkulturaj (ofta sekvo de sennaciigo) - ĝia plago.

Oksana.

* Galicio : Regiono de okcidenta Ukrainio, entenanta tri provincojn : tiujn de Lviv, Ternopil kaj Ivano-Frankivsk.

P.S. Mi finis ĉi tiun leteron kaj por ioma meditado metis diskon. Eksonis antikva ukraina kanto, verkita ankoraŭ en la 17a jarcento de fama popola kant-kreantino Marusja Ĉuraj. Mi turnadis diskpoŝon en manoj. Sur ĝi videblis nomoj de kantistoj kaj indiko : registrita en Kanado. Junaj voĉoj, kiujn mi aŭdis kanti, apartenis al pranepoj de unuaj ukrainaj elmigrintoj, kiuj, pelite de mizero, venis Kanadon komence de la 20a jarcento. Mi aĉetis la diskon en ukraina librovendejo en Londono. Aŭskultante, mi pensis : ĉu ĉio estas nur iluzio ? Ĉi tiu kanto, Marusja Ĉuraj, bildoj de Dnepro antaŭ miaj okuloj, miaj sentoj (multfoje korpe sentataj), ke mi apartenas al ĉi tiu konkreta popolo, ne "la plej bona", sed ankaŭ ne malbona (tiaj simple ne ekzistas, kiam temas pri bonaj-malbonaj nacioj) - al mia popolo ? Aŭ ĉio estas nur son-, vid-, sent-halucinacioj ? Oni sonoris ĉe pordo. Alvenis miaj francaj samfamilianoj. Ili aŭskultis kaj diris, ke la melodio estas ege plaĉa, nur - bedaŭrinde - eĉ ne unu vorton ili komprenis. Helpe de Esperanto kaj iom la franca mi tradukis la tekston, ofte devigante eniri historiajn (folklorajn, morajn) detalojn, ĉar ili estis por francoj ne tuj kompreneblaj. Ni konstatis : efektive, zoologie ni ĉiuj apartenas al speco Homo sapiens (almenaŭ ni tion esperas), kun sama fiziologio, patologio, mensa potenco k.s. Tamen ni estas diversaj, ĉar ni edukiĝis en du diversaj kulturoj kaj dum ĉi tiu tradukado-klarigado ni konstruis pontojn inter la du (ĉar ambaŭ estas eŭropaj, tio ne estas tro komplika). Mi kaj mia edzo, ni ambaŭ havas francan ŝtatanecon. Tio estas fakto (jen kuŝas niaj identigiloj). Sed tio aŭtomate ne faras nin samaj. Sufiĉas, ke ni tuŝu iun demandon pli profunde, kaj tuj aŭdiĝos : "Kaj ĉu vi scias, ĉe ni... kaj ĉe ni tiuokaze oni diras tiel...ho, la samteman poemon havas ankaŭ Lesja Ukrainka*... ktp. Centfoje, ĉiutage ! Ĉu - ĉiutaga iluzio ?!

* Lesja Ukrainka - fama ukraina poetino (1871 - 1913)

PRI NOVA ABSURDA KONFUZO

Nia amiko Deker tute ne respondas al la argumentoj de Oksana. Li nur anstataŭigas la kutiman ĉe francoj konfuzon inter nacio kaj ŝtato per la kutima ĉe nazioj konfuzo inter nacio kaj raso.

La nacia aparteno de individuo ne dependas de la kromosomoj, kiujn li ĉe la koncipiĝo heredis de siaj biologiaj gepatroj, sed de la ricevita eduko. Plej ofte infanon edukas ĉefe

ĝiaj biologiaj gepatroj, tial plej ofte la influo de la nacia kulturo aldoniĝas al la biologia determino. Sed temas pri du distingaj aferoj. Ekzemple, kolemino mia, naskinte du filinojn, adoptis nigrarasan bebon el Sri Lanko. Li aĝis nur 2 monatojn, kiam ŝi ekokupiĝis pri li ; ŝi parolas al li france, post kelkaj jaroj ŝi sendos lin al franca lernejo, ktp. Tiu nigrarasa bebo tute ne fariĝos ŝrilankano : li estos same franca, kiel liaj fratinoj. Nur rasistoj povas tion ne kompreni.

Kara Deker, la nacieco de viaj nepoj dependos de la eduko, kiun ili ricevos. Kvankam mi ne havas pri tio personan sperton (mi estas nur franca), mi opinias, ke individuo estas bonŝanca, se li apartenas samtempe al pluraj nacioj. Tial mi esperas, ke tiuj, kiuj edukos viajn nepojn, profitos de ilia familia situacio por alkiutimigi ilin partopreni en pluraj kulturoj. Mi esperas, ke tion faros ankaŭ Oksana, se ŝi iam naskos infanojn.

Tion mi esperas, ĉar mi estas mondcivitano. Jam juna mi ekinteresiĝis pri la pens-, sent- kaj agad-manieroj de homoj malsimilaj ol mi. 18-jara mi fariĝis samtempe mondcivitano kaj esperantisto. Ĝuste ĉar mi estas mondcivitano mi malŝatas tion, kion PIV difinas je la vorto "sennaciismo" : kultura doktrino, fondita de Lanti, kies ĉefaj celoj estas la malapero de ĉiuj nacioj rigardataj kiel suverenaj unuoj, la racia utiligado de ĉia materialo kaj energio profite al ĉiuj homoj, unuecigo de ĉiuj mezuriloj kaj kalkuliloj, kaj uzado de Esperanto kiel sola kulturlingvo. Mi ne komprenas, kiel kultura doktrino povas celi anstataŭigi la buntecon de la homaj kulturoj per unukoloreco. Ke la unusola koloro estus la verda ne konsolus min pri la netaksebla perdo, kiun tia evoluo kaŭzus al la homaro. Mi esperas, ke ankoraŭ en la jaro 11987a la homaro estos bunta.

Jakelino.

"La krizo : kiu elirejo ?" jen estos la temo de nia venonta debato per ĉenleteroj. Ĉar paŭzas nun 2 el la partoprenintoj, ni vokas tiujn, kiujn interesas esprimi sin per tiu rimedo. Necesus 2 aŭ 3 gevolontuloj, prefere nefrancdevenaj. Jen skeme la funkcioprinciparo de la afero :

- 10/12 gevolontuloj estas arigitaj en 3/4 "rondojn", kies konsisto ĉiufoje ŝanĝiĝas. La red. de L! sendas tem-enkondukon al la unua ricevonto de ĉiu rondo.

- Tiu aldonas sian vidpunkton kaj transsendas al la dua adreso, ktp. (Oni disponas 10/15 tagojn por tion fari). La lasta ricevonto en ĉiu rondo transsendas al la red. de L!, kiu aperigas la materialon en la gazeto.

- Estas ĝenerale 3 temoj jare, proponitaj de ĉenleteranoj mem aŭ de aliaj abonantoj. Eblas ĉiumomente paŭzi aŭ ekŝiĝi el la afero. Endas nur nepre transsendi al la sekvanta adreso, eĉ se oni ial ne partoprenas. Kisan antaŭdankon al la gevolontuloj! Kribo

T O S T O

Forpasas la ducenta jaro de la nova erao. Restas nur dek kvin minutoj ĝis la monato, tago kaj horo, en kiu antaŭ du jarcentoj la lasta lando kun ŝtata sistemo, la plej obstina, konservativa kaj malsprita el ĉiuj landoj - G. - plej poste estis decidinta foriĝi de sia delonge maljuniĝinta kaj ridinda nacia originaleco kaj je jubilo de la tuta terhomaro aliĝis ĝoje al la universala anarkiista asocio de la liberaj homoj. Kaj laŭ la malnova, kristana jarnombrado nun estas antaŭvespero de 2906-a jaro.

Sed nenie oni renkontis la novan ducentjariĝon per tiel impona solenaĵo, kiel sur Norda kaj Suda polusoj, en la ĉefaj stacioj de la grandega Elektromagneta Asocio. Dum la lastaj tridek jaroj multmiloj da teknikistoj, inĝenieroj, astronomoj, matematikistoj, arkitektoj kaj aliaj scienc-specialistoj estis laborantaj abnegacie por la realigo de la plej emocia, la plej herooa ideo de la dua jarcento. Ili estis decidintaj por refari la terglobon en grandiozan elektromagnetan bobenon kaj pro tio ili ĝin ĉirkaŭvolvis ekde nordo ĝis la sudo per spiralo el ŝtalo, ĉirkaŭita per gutaperka dika ŝnurego, longa ĉirkaŭ kvar miliard-ojn da kilometroj ; starigis sur ambaŭ polusoj elektroricevilojn kun enorma kapacito kaj poste kunigis inter si ĉiujn lokojn de la Tero per sennombre multaj metalfadenoj. Tiu miriganta entrepreno estis observata kun maltrankvilo ne nur de sur la Tero, sed ankaŭ de sur la plej proksimaj al ĝi planedoj, kun kiuj la terloĝantoj subtenis konstantajn komunikaĵojn. Multaj rigardis al la iniciato de la Alianco kun malfido, aliaj kun timo kaj eĉ kun terursento.

Sed la forpasinta jaro estis jaro plena je brilanta venko fare de Alianco super la skeptikuloj. La neelĉerpebla magneta forto de la Tero ekmovigis ĉiujn fabrikojn, uzinojn, agromaŝinojn, trajnojn kaj ŝipojn. Ĝi lumigis ĉiujn stratojn kaj domojn kaj varmigis ĉiujn loĝejojn. Same forigis la bezonon de plua uzado de la ŝtonkarbo, kies minkuŝejoj delonge estis elĉerpitaj. Forigis de sur la Tero la sennombrajn kamentubojn, kiuj venenis la aeron. Savis la florojn, herbojn kaj arbarojn - tiun veran ĝojon de la Tero - de la formorto kaj de la pereado, kiuj fortimigis ilin. Poste ĝi donis neantaŭviditajn rezultojn ĉe agrokulturo, altigante preskaŭ ĉie kvaroble la produktivecon de la grundo.

Unu el la inĝenieroj de la Nordstacio, elektita kiel hodiaŭa prezidanto, stariĝis kaj levis sian pokalon. Ĉiuj en la momento eksilentis, kaj li diris :

- Estimataj, se vi konsentos, mi tuj kontaktos kun niaj kunlaborantoj, kiuj laboras sur la Sudstacio. Ili ĵus signalis.

La grandega kunsidhalo sterniĝis senfine malproksime. Ĝi estis belega konstruaĵo el vitro, marmoro kaj fero, kun ĉio pribeligita per ekzotaj floroj, pompaj arboj, kaj pli ĝuste ŝajnis mirinda oranĝerio, ol publika loko. Ekstere estis polusa nokto, sed, danke al la funkciado de specialaj kondensiloj, brila suna lumo gaje surverŝis kaj la verdajn kreskaĵojn, kaj la tablojn, kaj la vizaĝojn de la miloj da jubileantoj, kaj la sveltajn kolonojn, kiuj subtenas la plafonon, kaj la mirindajn pentraĵojn kaj statuojn inter la fenestroj. La tri muroj de la kunsidhalo estas diafanaj, sed la kvara, al kiu dorse sidas la prezidanto, prezentas blankan kvarangulan ekranon, faritan el eksterordinare delikata, brilanta kaj fajna vitro.

Kaj jen, tuj post la ricevo de la konsento el la kolektiĝantoj, la prezidanto premetis butonon sur la tablo. Kaj tuj la ekrano briliĝis de blindiga kaŝa lumo kaj ŝajne ĝi fandiĝis, kaj malantaŭ ĝi aperis same tiom alta, malproksimen sterniĝanta belega vitra palaco kaj ankaŭ tie sidis ĉetable fortaj, belaj homoj kun gajaj vizaĝoj, en belegaj brilantaj vestoj. La unuaj kaj la aliaj, distancigitaj per dudek mil verstoj (21 400 km), konis sin reciproke kaj ridis unu al alia kaj kiel salutsigno levis siajn pokalojn. Tamen, pro la komuna rido kaj ekkrioj, nun ili ne povis aŭdi la voĉojn de siaj malproksimaj amikoj.

Tiam denove stariĝis la prezidanto kaj eksilentis liaj amikoj kaj kunlaborantoj sur ambaŭ finoj de la Terglobo.

Kaj li diris :

- Karaj miaj gefratoj ! Kaj vi belegaj virinoj, al kiuj nun impetas mia granda amo ! Kaj vi, fratinoj, kiuj pli frue amis min, vi, al kiuj mia koro estas superplena je dankemo ! Aŭskultu ! Gloron al la eterne juna, belega kaj neelĉerpebla vivo! **Gloron** al la sola dio sur la Tero - la Homo! Ni eklaŭdu ĉiujn ĝojojn de ĝia korpo kaj adorkliniĝu solene kaj profunde al ĝia senmorta racio! Jen, mi rigardas vin - fieraj, kuraĝaj, trankvilaj, gajaj - kaj mia animo flamiĝas pro amo ! Nenio limigas nian menson kaj mankas bariloj kontraŭ niaj deziroj. Ni konas nek obeemon, nek regpovon, nek envion, nek malamon, nek perforton, nek tromplogon. Ĉiutage malkaŝiĝas antaŭ ni tutaj amasoj da mondaĵoj kaj pli kaj pli ĝoje ni ekkonas la senfinecon kaj tutpovecon de la sciado. Kaj eĉ la morto ne

timigas nin, ĉar ni forlasas la vivon ne misformitaj de malbela de la maljuneco, ne kun sovaĝa hororo en la okuloj, kaj ne kun la malbeno sur la buŝo, sed belaj, disimilaj, ridemaj, kaj ne alkroĉiĝas konvulsie al la veinda restaĵo de la vivo, kaj silente fermas siajn okulojn, kiel lacaj vojaĝantoj. Nia laboro estas ĝojo por ni, kaj nia amo, liberigita de ĉiuj ĉenoj de la sklaveco kaj vulgareco, similas al la amo de la floroj : tiom ĝi estas libera. Kaj nura nia mastro estas la homa genio!

Amikoj miaj! Verŝajne mi diras delonge konatajn komunajn aferojn ? Sed mi ne povas nun konduki alimaniere. Ekde ĉi-mateno daŭre mi legas rimarkindan kaj timigan libron. Tiu libro estas Historio de la revolucioj dum la XX-a jarcento.

Ofte mi pensas, ĉu mi ne legas iun fabelon ? Tiom never-simila, tiom monstra kaj stulta ŝajnas al mi la vivo de niaj tiamaj prauloj, malproksimaj de ni per naŭ jarcentoj.

Malvirtaj, malpuraj, infektitaj per malsanoj, malbelaj, mal-kuraĝaj - ili estis similaj al abomenindaj homaĉoj, fermitaj en malvasta ĉelo. Unu estas ŝtelinta de aliulo pecon da pano kaj estas forportinta ĝin en malluman angulon kaj kuŝas sur ĝi vizaĝaltere, por ke aliulo ne vidu ĝin. Ili forprenadis reciproke la loĝejojn, akvon, grundon. Grupoj da aviduloj kaj diboĉuloj, subtenataj de hipokrituloj, forlogantoj, ŝtelistoj, superfortuloj, incitas grupon da ebriaj sklavoj kontraŭ alian konsistantan el tremantaj idiotoj kaj daŭre vivas kiel parazitaj sur la pusaĵoj de la socia disvolvado. Kaj la Tero, tiel vasta kaj belega, far-iĝis malvasta por la homoj kaj miasma kiel en tombejo.

Tamen tiam, inter obeemaj ŝarĝbestoj, meze de malkuraĝaj rampuloj kaj sklavoj neatendite leviĝis kapoj de la netoleremaj homoj, herooj kun ardantaj animoj. Kiel ili naskiĝis en tiu malhonesta kaj malkuraĝa jarcento - mi ne povas kompreni! Sed ili eliris sur la placoj kaj sur vojkruciĝoj kaj diradis : "Vivu la libereco!" Kaj en tiu terura sanga tempo, kiam eĉ ne unu privata domo estas sekura rifuĝejo, kiam la perforto, torturado kaj mortigado estis premiataj carmaniere, tiuj homoj en sia sankta deliro kriis : "For la tiranojn!". Kaj ili ruĝiĝis per sia verama kaj ardanta sango la ŝtonplatojn sur la trotuaroj. Ili frenezigiĝis en la malliberejoj. Mortis sur la pendigiloj kaj pafilejoj. Reznis bonvole ĉiujn ĝuojn de la vivo, escepte de nur unu ĝojo - morti por la libera vivo de la estonta homaro.

Amikoj miaj ! Ĉu vi ne vidas tiun ponton el homaj kadavroj, kiu kunigas nian brilegantan estanton kun la terura obskura estinto ? Ĉu vi ne sentas tiun sangon riveron, kiu forportis la

tutan homaron en la vastegan brilan maron de la tutmonda feliĉo ? Eternan rememoron al vi, anonimaj, al vi senvoĉaj suferintoj ! Kiam vi mortadis, en viaj klarvidaj okuloj, direktitaj al foreco de la jarcentoj, eklumis rideto. Vi antaŭvidis, ke ni estos liberaj, fortaj kaj jubilantaj. Kaj en la grandega momento de la morto vi sendadis vian benon.

Amikoj miaj ! Bonvolu ĉiu el vi silente, senforte, solece kun sia propra koro eltrinki sian pokalon memore al tiuj mal-proksimaj martiroj. Kaj bonvolu ĉiu el vi eksenti en si mem ilian abnegacian benantan rigardon!...

Kaj ĉiu silente eltrinkis. Sed virino kun eksterordinara bel-eco, sidanta apud la oratoro, tuj alpremis sian kapon sur lia brusto kaj sensone ekploris. Kaj kiam li ekdemandis ŝin pro kio ŝi ploras, ŝi respondis apenaŭ aŭdeble :

- Kaj krome... kiel mi dezirus vivi dum tiu tempo... kun ili... kun ili...

Fino

ALEKSANDRO IVANOVIĈ KUPRIN. Naskita : 26.08.1870 en urbo Novĉad, proksime al Penza, Rusio. Mortinta : 25.08.1938 en Leningrado, USSR.

J. MANCEAU :

Tiel bela stacidometo !

Spite al teoriaj duboj, sed post decidigaj eksperimentoj, kiuj montris ke la movradoj ne fiksluke glitturniĝas sur la reloj, oni kuraĝis anstataŭigi la ĉevalojn per vaporlokomotivoj por tiri la trajnojn, kio estis granda progreso, kaj malgraŭ la diro de la granda sciencisto ARAGO, ke en tuneloj la vojaĝantoj asfiksiĝos pro sulfuraj gasoj, oni tamen boris ilin. Sed escepte por kelkaj neŝanceleblaj progresemuloj, la fervojoj restis tre malbonfamaj. La urbanoj timis speciale la fumon kaj la vibradojn, kiuj nur malbonan efikon povus havi al la ĝenerala sano de la enloĝantoj. Pro tio, kiam privata kompanio konstruis fervojon por interligi PARIZON kun ORLEANO, kaj poste TURANĜO kaj BORDOZO, la prudenta kaj singardema konsilantaro de ORLEANO tute rifuzis, ke la trajnoj trairu la urbon, kio ne malhelpis, ke la kompanio konservis sian nomon "Kompanio de Parizo al Orleano" (kompanio P.O.). Pli poste, la turanĝanoj sin montris ne malpli prudentaj kaj singardemaj.

Okazis ke direktoro de tiu P.O.Kompanio havis nevon, kiun li tenere ŝatis. Tiu nevo havis ĉiujn postulitajn kvalitojn por fariĝi ne nur taŭga, sed bonega staciestro : lerta kontisto, li estis ankaŭ tre atentema kaj pacienca por atendi la trajnojn, kiuj ne ĉiam alvenis akurate, egalanima kaj elturniĝema por trankvile solvi ĉiujn ĉi-priajn problemojn. Li havis grandan memoron pri la ciferoj, do povis parkeri ĉiujn trajnhorojn ; plie, li, en kolegio ricevis la ekscelencan premion pri franca geografio, kaj sciis precize loki ĉiun departementan, distriktan aŭ eĉ kantonan ĉefurbon. Mense, li multe vojaĝis, sed, tre saĝe, tia vojaĝado sufiĉis al li : li eĉ malŝatis fakte vojaĝi mem, kaj povis sen ĵaluzo vidi antaŭ si la trajnojn preterpasi. Krome, li estis edziĝinta kun tre bela virino ; li do havis ĉiujn kvalitojn por fariĝi tute laŭorda staciestro.

Bedaŭrinde, ĉiuj stacioj de P.O.-linio estis jam estrataj ; kion fari por tiu kara nevo ? Ni rimarku, ke inter PARIZO kaj BORDOZO la trajno tiomfoje haltis, ke unu plia halto estus apenaŭ rimarkebla. Plie, ĉar la trajno jam atingis rapidon de 80 ĝis 100 kilometroj hore, la ĉevaloj kaj la tiamaj aŭtomobiloj estis al ĝi, rapidece, ne konkurencpovaj ; oni eĉ povis ofte halti kaj konservi sian rapidecan avantaĝon. Tiel eblis kolekti ĉie ĉiujn vojaĝemulojn kaj tiucele halti laŭvoje en ĉiu urbo kaj urbeto. Tio estis ankaŭ okazo por la hejtisto enmeti akvon en la lokomotivan ujon, kio estas kompreneble ŝparefika: ju pli ofte oni provizas, des malpli peze oni transportas, ĉu ne ?

Sed, se establi plian halton surkampare, kiel nomi ĝin, ke ĝi havu nomon bonaspektan kaj seriozan, ke la vojaĝantoj ne miru pri ĝi ? La sintruda tiucela ideo estis doni al ĝi nomon de sanktulo, kio igus la aferon nediskutebla. Sed kiun sanktulon elekti, por ne ŝoki la religiemajn preferojn, ke ili kredu kaj ne diskutu ?...

Antaŭ kelkaj jaroj, oni ekkonsciis, ke plejparto el la sanktuloj, kiuj havis sian lokon rezervitan en la kalendaro ne havis la paralelan rezervon en la ĉielo, kaj se oni iom kribris la sintruditajn, tiu pliriĉigo de la sanktularo daŭris tamen longe. Ĉu ne same fari por la nova stacidomo, eble la nova sanktulo ĝuus tre longan ekziston, ĉar kiu pastro rimarkus tion : oni eble preĝas sanktulon de la kalendaro, sed oni kutime ne preĝas stacidomon! Subite, la direktoro ricevis iluminon, kiam li memoris pri la farso de la gazetisto Paul BIRAULT, kiu en 1913a kunigis la famojn de Jules SIMON kaj de Hégésippe

MOREAU kaj kreis novan famulon per kopulacio de ties du nomoj. Tiel li sendis cirkuleron je la nomo de "Komitato por la celebrado de la jarcenta naskiĝtago", kaj starigo de statuo je la memoro de la fama Hégésippe SIMON, tiu heroldo de demokratio, kiu kuraĝis proklami tiujn definitivajn vortojn : "La tenebroj foriĝas, kiam leviĝas la suno!" Li petis pri patron-eco kaj okaze de la inaŭguro de la statuo, pri eventuala parolado (kun ĉi-kaze, abunda dokumentado je dispono). Notinde estas, ke 15 deputitoj kaj 17 senatanoj jese respondis, kio pruvas kiel grandanime akceptemaj por la popolbono, kaj senantaŭjuĝaj ili estas krom pri la Esperanta afero.

Samprocede kiel Paul Birault, oni do tranĉu ĉiun nomon de du sanktuloj en du partojn, kaj kunmetu du el tiuj partoj : laŭ aritmetika leĝo, duono de sanktulo plus duono de sanktulo estas tutplena sanktulo. Ĉar la edzino de la direktoro estis ĉarentanino, ŝi proponis pri Sankta Saviniano, kaj ĉar li mem naskiĝis en proksimo de CASTELNAUDARY, venis en lian kapon la nomo Sankta Fereolo. Tiel naskiĝis Sankta SAVI-OLO, kaj la Diablo min prenu, la pruvon pri la vereco de ĉio ĉi tio vi trovos sur la trajnlinio de Parizo al Bordojo, inter POITIERS kaj RUFFEC, kiam vi konstatos, ke meze de kvietaj kamparo sidas izola stacidomo... kies nomo tekstas "SAINT-SAVIOL" (Sankta Saviolo).

Tion ĉi supre, mi revis, revenante de la Esperanta teatra festivalo en Parizo al mia hejmo en SAINTES.

POR NIAJ INFANOJ...

Gastono

Jen konstruo de dialogo kun infanoj dum la posttagmezaj ekskursoj. Ni devis trovi ideon por prezenti la tekston antaŭ la publiko de la restoracio, post la vespermanĝo.

Tiun tagon, mi ne havis ideon por la teatraĵeto, la infanoj ankaŭ ne. Ni preskaŭ silente supreniris la interklifan vojeton, ĝis la loko, el kie ni povis preskaŭ sendanĝere grimpi ĝis la supro.

La unua, kiu alvenis supre, alvokis min : "Ĉu vi trovis iun temon?"

"Ne, sed rigardu ĉiuj bone ĉirkaŭ vi kaj certe vi trovos ion!"

Post momento, iu kriis : "Mi trovis!". Fakte, li trovis belan tranĉilon forgesitan de iu ŝafgardisto.

Mi diris al li : "Lasu ĝin ĉi tie, la posedanto eble revenos por preni ĝin."

Sed la knabo diris : "Jen la ideo : ni trovis tranĉilon!".

Mi aldonis ridetante : "Nun restas trovi la historion de la tranĉilo. Malfacila afero!"

Knabino diris : "Estas la tranĉilo, kiu servis por murdi la reĝon Henriko la 4-a."

"Neeble, diris ŝia frato, ĝi estas tute nova, kaj tiu afero iom datumas!"

Mi proponis akordigi la du vidpunktojn, sen diri nomojn, sen precize diri la epokon, kaj jen la belega teksto, kiun la infanoj mem verkis, preskaŭ sen mia helpo, kaj paro el ili diris ĝin vespere preskaŭ kiel profesiaj aktoroj.

La Tranĉilo

Knabino - Iam estis tranĉilo,

Knabo - Bela, bona tranĉilo, kiu vojaĝis de la fabriko ĝis la vendejo,

- **Sed surstrate, ŝnuro rompiĝis,**

- kaj la tranĉilo falis ekster la veturilo!

- **Malfeliĉa tranĉilo, kiu povis esti uzota nur por tranĉi panon kaj viandon,**

- Aŭ ledajon,

- **Aŭ aliajn varojn,**

- Ĝi restis sur la vojo, preskaŭ kovrite de polvo!

- **Sed alvenis monaĥo...**

- Li vidis la tranĉilon!

- **Prenis ĝin,**

- Rapide rigardis ĉirkaŭ si,

- **Kaj la tranĉilo malaperis sub liaj vestaĵoj.**

- Tiu monaĥo havis strangan rigardon!

- **Rigardon de fanatikulo!**

- Per la tranĉilo, li murdis la reĝon!

- Morala konkludo -

- **Amikoj, kiam iun tagon vi vidus tranĉilon kaj samtempe fanatikulon, ne lasu la fanatikulon ludi per la tranĉilo!**

- Estus danĝere por la reĝo!

La knabino estis preskaŭ 13-jara, jam virineto ; la knabo estis ĉirkaŭ 10-jara, la aliaj inter 9 kaj 13 (kaj mi 42).

*

Mi uzas miajn tekstojn ne nur por la kunvenoj, sed foje por instrui la francan lingvon kaj ties ortografion. Antaŭ ol dikti tiajn tekstojn, mi klarigas jenan atentigon : "Ĉio estas

en la imago, sed la imago ne devas esti ĉio!". Tiu aserto iom plagiatas Edmundon Rostand, kiam li skribis por **Cyrano de Bergerac** : "Ĉio, kio venas de la fifro, foriras per la tamburo!", modelo de ekvilibro inter du malsamaj mensostatoj.

- La Suburbo de la poetoj -

Kiu estis tiu placo, nekonata de mi, en la suda Parizo, kie mi troviĝis kvazaŭ pro ensorĉado ? Nenie mi vidis pli beletajn, pli harmoniajn aĵojn, tiel pro la formoj, kiel ankaŭ pro la koloroj.

Kaj tiu senmotora veturilo, vera fluganta tapiŝo, sur kio beleta knabino sidanta invitis min eksidi apud ŝi.

- "Kien ni iras per tiu veturilo?"

- "Estas mia persona "Metroo", ni iras ĉe nin!"

Iom surprizite, mi rigardis ŝin de pli proksime ; ŝi prenis mian manon dirante : "Ne timu, oni neniam falas ekster mian "Metroon".

La domoj defilis, ĉiuj tre belaj, tre agrablaj, kaj en tiu suburbo de mondekstremaĵo infanoj ludis, ĉiuj malpeze vestitaj per dolĉaj kaj ŝanĝbrilaj koloroj : ĉiuj aspektis vivĝojaj.

Iu afero mirigis kaj obsedis min. Mi deziris vidi nomojn de stacioj, sed ĉiam nia "Metroo" evitis pasi antaŭ la afiŝetoj, pasante malantaŭ ili. Fine, ĝi eniris domon. La knabino mal-supreniris ĉe sia flanko, mi ĉe la alia, kaj ĝi reiris tien, de kie ĝi venis.

- "Kio estas cia nomo" mi diris al mia ĉarma gastigantino.

- "Kial scii mian nomon, ĉu mi demandas al ci cian ? Ĉi tie estas la lando de la poetoj, ne estus sufiĉe da beletaj nomoj por nomi la aĵojn kaj la homojn. Ci estas ci, Mi estas mi. Mi elektis cin kiel amikon. Ne starigu al ci demandojn, travivu nian feliĉan minuton."

- "Tamen, estas vere mirinde, ke ci elektis min anstataŭ unu el tiaj belaj knaboj, kiujn ni renkontis ; mi estas preskaŭ mal-juna, ne tre bela..., kaj iom mirstultigita pro tio, kio okazas al mi!"

- "En la lando de la poetoj, oni amas ĉion kaj ĉiujn, estas pro tio, ke ĉio estas bela. Nia spirito ne vidas la aĵojn tiaj, kiaj ili estas, sed tiel, kiel ni revas ilin, kiel ni imagas ilin. Ĉu ci ne revis tian pejzaĝon, havi kunulineton kiel mi apud ci? Cia revo fariĝis realaĵo, pro imaga forteco. Venu apud min, kisu min!"

Mi alproksimigis mian buŝon al ŝia. Je la momento de la kontakto, mi vekigis, mi kisis nur mian kapkusenon!

Tamen estis belega revo... kiu kostis al mi bedaŭran larmon!

ĈIES VOĈO

(daŭrigo)

Shao Shukang :

Io neniam sentita

En la diskutado kaŭzita de mia artikolo "Ĉapeloj de Esperanto", mi sentas ion, kion nia tero ne donas kaj kio varmigas korojn kaj antaŭenigas ian ajn entreprenon.

La de mi aspirataj gesamideanoj certe pardonas mian senfortecon derivatan de la de ĉiu konata kialo kaj malhelpantan la oftecon de mia komunikado kun miaj karaj gesamideanoj.

Ĉapelo-problemo kaj pli

Pri la ĉapeloj de Esperanto nia "laŭte!" publikigis jenajn artikolojn : 57,p.21, P.M.G. : "Pri B.E." ; 59,p.35, P.M.G. : "Ĉapeloj" ; 64,p.48, P.M.G. : "Aforismoj" ; 67,p.53, P.M.G. : "Pri senĉapelaj literoj" ; 69,p.40, Shao Shukang : "Ĉapeloj de Esperanto" ; 70,p.21, J'ANSEB... : "Iu plia artikolo pri supersignoj!..." ; p.22. LORENT : "Kia malracia solvo!", p.23, VALO : "Ĉapeloj" ; 71,p.46, Conrad Fisher : "Letero el Usono" ; p.47, Suzanne : sentitola artikoleto ; p.47, P.M.G. : "Pri ĉapeloj" ; p.48, Valo : "Esperanto sen ĉapeloj" ; p.49, H.Dito Goeres : sentitola artikolo ; 72,p.54, J.MANCEAU : "Ankoraŭ pri la ĉapelitaj literoj de Esp-o".

Aldono de mia seka informfonto : "MONATO" 1/1987,p.6, Jim Deer (Usono) : "Provizora metodo". Ĉe SIGKOMP/ELNA, sub-grupo en Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, por trakti la problemon de supersignoj en uzado de komputilo por edukaj celoj, oni uzas la karakteron " < ".

Nur tiuj ne sufiĉas por nia nuna diskutado. Pli da materialoj ne akireblas de mi, sed mi povas eltiri instruojn el "Historio de Esperanto" de Léon Courtinat :

- p.236 : "... lingvo estas samtempe socia kaj tradicia fenomeno."

- p.234 : "Trifoje la provoj reformi E. de interne fiaskis,..."

Komentario : unuafoje proponita de Zamenhof je postuloj de reformemuloj kaj voĉdonita en 1894 de la abonantoj de la gazeto "Esperantisto" (p.49-74) ; duafoje samkiale proponita de Zamenhof en la letero (22/11/1906) al Boirac, Prezidanto de la Lingva Komitato, kaj detenita en nepubliko pro la opono de Bourlet kaj Boirac (p.185-201) ; triafoje la Ido-skismo, 1906-1914 (p.217-233).

- p.233 : "Prof. Jarkov opinias ke la inerta popolo esperantista servis kiel garantio por Esperanto ĉe la disvolvo de la Ido-krizo."

- p.236 : "... skribis Michaux al Waringhien (20/3/1933)... mi akiris la certon ke estas neeble reformi E. eĉ ne la supersignitajn literojn..."

Jen revenu nia temo per la diro de konservativa Boirac en la letero responda al Z. (9/12/06) (p.198) : "La historio de E jam sciigis nin, ke tre multaj estas la punktoj, pri kiuj povas interkonsenti reformantoj de nia lingvo..."

Ĉu ne estas tia nia mallonga kaj enrondeta diskutado je tiu linia (malvasta) problemoj, kiu ne rangindas reformaĵo ?

